

3/2021

Majo  
Junio

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Vojaĝo al Taŝkento
- ★ Denove sur Ĉantorio
- ★ Transponta Esperanto-Kongreso 2021

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodzo@wp.pl](mailto:rk-lodzo@wp.pl)

## **Adreso de redakcio**

Robert Kamiński, ul. Kwiatowa 1/3  
94-227 Łódź

## **Kunlaboro**

Teresa Nemere, Andrzej Sochacki,  
Magdalena Tatara, Adam Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2021 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 53 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj

Cifereca (pdf)

Pollando - 25 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per

Konto de PEA en UEA: [peaa-v](mailto:peaa-v@uea.org);

Detaloj trovigas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>  
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Fronta kovrilpaĝo - Pastro Roman Gmyrek - animzorganto de pola  
esperantistoj.

## **Estraro de PEA**

Robert Kamiński - prezidanto  
Agnieszka Mozer - vicprezidanto  
Zofia Śmistek - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la autoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Represo kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto

Bankokonto por donacoj  
64 2130 0004 2001 0558 6110 0001  
liberan monsumon priskribu  
per vorto "Darowizna"



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>Estraro informas</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , Transponta Esperanto-Kongreso de GEA, PEA kaj IFEF .....	3
<b>Eventoj</b>	
<i>Adam Wilkus</i> , Denove sur Ĉantorio .....	5
<a href="https://keli.sea-vroc.eu/">https://keli.sea-vroc.eu/</a> , Kristana Kongreso - Legnica 8-15.08.2020 .....	8
<b>Mojose</b>	
<a href="http://www.pej.pl">www.pej.pl</a> , Ĝis JES nur kvin monatoj! .....	10
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Jagoda Greger</i> , Vojaĝo al Taŝkento .....	11
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , Ni ŝparu akvon .....	14
<i>Irena Solarek</i> kaj <i>Teresa Sibilak</i> , Kijivo – virtuale kaj kun belaj travivaĵoj .....	16
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
<i>Bert Boon</i> , Internacia Esperanto-Arkivo, .....	18
<b>Vizitindaj lokoj</b>	
<i>Paweł Dzienis</i> , Marŝalo en la suna vilaĝo .....	19
<b>Homoj</b>	
<i>Ulrich Lins</i> , Izrael Lejzerowicz - radikala esperantisto – 2-a parto .....	22
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, <i>Da</i> – detalaj reguloj .....	27
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , Patrono dela jaro 2021 - Tadeusz Rózewicz .....	30
Poeziaĵoj de Gizela Sklorz .....	31
<b>Saĝulaj pensoj</b>	
<i>Pola Retradio</i> , La saniga efiko de la ŝtupargrimpado, .....	32
<b>Leterkesto</b>	
<i>Jerzy Dryja</i> , Trajno Zamenhof daŭre vojaĝas .....	33
<i>Robert Kamiński</i> , Oni demandis pri Esperanto kaj ĝia kreinto .....	33
<i>Ilona Koutny</i> , Informoj pri la nova interlingvistika grupo .....	34
<b>Kalendaro de Esperanto-aranĝoj</b>	34
<b>Diverse, facile, bonguste</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , Biskvito, kiu ĉiam sukcesas kaj kreskas bele. ....	36
<b>Oni eldonis</b>	
<i>Przemysław Wierzbowski</i> , Nacia Legado en Esperanto 2021, “Solaris” de S. Lem .	37
„Kun Dipatrino sur biciklo. Vojaĝo al miraklaj bildoj, ikonoj kaj sanktaj fontoj de Podlaĥio”, Roman Dobrzyński, „Verda Simio” .....	39
<b>Forpasis</b>	
Zbigniew Warmuz .....	41
<b>El la fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>	
<i>Andrzej Sochacki</i> , 11-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, 10-13.12.1993 .....	41
<b>Amuze</b>	
<i>Adam Wilkus</i> , Krucenigmo pri floroj .....	44

## Redaktoraj vortoj

### Karaj Legantoj

Pardonu, la tria numero de la ĉi-jara PE malfruiĝis, interalie pro la kongresaj laboroj. Ni strebos kompensi ĉi tiun malfruiĝon ankoraŭ ĉi-somere.

En la 3-a numero la ĉefa temo estas la virtuala Germana-Pola Esperanto-Kongreso 2021. La Kongreso, malgraŭ multaj timoj kaj problemoj okazis sukcese en la tagoj 21-a - 24-a de majo. En la Kongreso partoprenis ĉirkaŭ 350 personoj el multaj landoj. Mi bedaŭras, ke inter la partoprenantoj estis nur ĉirkaŭ 50 polaj esperantistoj. Do, nur 15% de ĉiuj partoprenantoj estis niaj samlandanoj. Ĉu eble patropreno en ĉi tia nova, interreta formo de la Landa Kongreso estas teknike tro malfacila por multaj samideanoj? Laŭ onidiroj, la virusa pandemio "preparos" por ni pli da siaj revenoj, do ni devas lerni partopreni en tiaj kunvenoj. Por pripensi tiun problemon, bonvolu legi la artikolon pri la Kongreso.

Ni atentigas vin ankaŭ pri la artikolo de Paweł Dzienis, priparolanta vizitindan lokon - la malgranda, neordinara vilaĝo Paproć Duża, situata 125 km nordoriente de Varsovio. La vilaĝo havas tre originalan formon kaj interesan historion, ligitan kun Józef Piłsudski.

Ne pretelasu ankaŭ la sekvan parton de la tre interesa biografio de Izrael Lejzerowicz kaj rememorojn de Jagoda Greger pri unu el la unuaj, organizitaj en Pollando, esperantistaj vojaĝoj al la Centra Azio.

Meritas rimarki, ke la tradicio de esperantistaj renkontiĝoj sur la monto Ĉantoria Granda travivis la pandemion kaj la aranĝo daŭre okazas. Esperantistoj el Pollando, Ĉeĥio kaj Slovakio ĉijare denove tie renkontiĝis. Partoprenis en tiu evento ankaŭ Adam Wilkus kaj li sendis al niaj paĝoj sian raporton pri la okazintaĵo.

Ni ne forgesu legi la sekvan artikolon de la serio pri ekologiaj temoj de Małgorzata Komarnicka. Gravus ŝiaj multaj rimarkoj. Legu kaj ĝuu!



*Robert Kamiński*

*Robert Kamiński*

## Transponta Esperanto-Kongreso de GEA, PEA kaj IFEF

La 21-24-ajn demajo 2021, okazis nekutima virtuala Germana-Pola Esperanto-Kongreso. La historio de ĝia organizado estas longa kaj ĝi komenciĝis per la vizito de germana esperantisto Johano Pahter en Varsovio. Johano ĉeestis la kunvenon de la Ĉefa Estraro de PEA en 2019 kaj prezentis proponon de komuna kongreso antaŭe anoncitan kaj prezentitan al la estraro fare de antaŭa PEA-prezidanto Aleksander Zdechlik.

Germanaj esperantistoj proponis la organizadon de komuna kongreso de PEA kaj GEA. Al la organizantoj aliĝis esperantistaj fervojistoj el Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). Komence la kongreso estis planita en Frankfurto (ĉe Odro). Post la diskuto, estis konsentite, ke parto de la kongreso okazos sur la pola flanko de la limo la en urbo Słubice. La dato de la kongreso estis interkonsentita por la fino de majo 2020. La unua organiza kunveno okazis en 2019 en Poznań dum la lasta „Arkones”. La sekva renkontiĝo de la organizantoj okazis en Słubice en la konstruaĵo de Collegium Polonicum, kiu estas filio de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań. Financan subvencion akiris la kongreso de la Fondaĵo por Pola-Germana Kunlaboro.

Bedaŭrinde, en marto 2020, aperis eksplodo de la pandemio de KOVIM-19 kaj organizo de la kongreso en majo 2020 montriĝis neebla. Dum postaj kunvenoj, la organizantoj diskutis, ĉu organizi la kongreson kaj en kiu formo. Oni konsentis translokigi la kongreson al 2021. La Kunlabora Fondaĵo konsentis financi la kongreson en 2021. La neantaŭvidebla evoluo de la pandemio rezultigis la fermon de universitatoj, kulturaj institucioj kaj, provizore, eĉ landaj limoj. En ĉi tiu situacio, en marto 2021, oni decidis refoje negoci kun la fondaĵo por transdoni financan subvencion al la kongreso en virtuala formo. Ricevinte aprobon de la financado, la antaŭe preparita programo de la kongreso estis rapide realigita.

Malgraŭ la timoj kaj la manko de sperto pri organizado de evento en la interreto, la programo estis plene efektivigita. Esperantistoj de GEA, pli spertaj pri retaj renkontiĝoj, estis la ĉefaj organizantoj kaj ili zorgis pri la efika teknika servo de kunvenoj, prelegoj kaj koncertoj.

La virtuala partopreno de parolantoj kaj artistoj ŝparis multajn kostojn. Tia nova formo de partopreno ebligis al multaj homoj aliĝon al la kongreso. Laŭ la kongresa libro, 355 homoj ĉeestis la kongreson.

La temon de la kongreso "Najbaroj" traktis pluraj interesaj prelegoj. La unua el ili estis prezentita de Ulrich Lins "Pola-germana interproksimiĝo - la kontribuo de esperantistoj". Alia tre interesa prelego estis tiu de profesoro Goro Kimura el Japanio "Translingva kunlaboro inter najbaroj - sed en kiu lingvo?". Valas menciis interesan prelegon de Zofia Śmistek pri problemoj kun Pola-Germana landlimo post la dua mondmilito kun la titolo: "Renkontiĝo de Mazowiecki kaj Kohl en Słubice".

Time	Speaker	Topic
12:15	Roman Dobrzyński	La opero Halka
12:30		
12:45		
13:00		
13:15		Plata Interfaco de Marek Najbowicki
13:30		
13:45		paŭzo
14:00		
14:15		SUS I
14:30	Amri Wandel	Nigraj Truoj kaj gravitaj ondoj (kun ekzameno)
14:45		
15:00		
15:15		
15:30	Michael Vrazitis (gvidanto)	Przemysław Wierzbowski: Ken tra mia literatur-merkato?
15:45	Renkontiĝo de Duolingo-lernintoj	Fervojaj fak-prelegoj I
16:00		
16:15		
16:30		
16:45		
17:00		
17:15		
17:30	EEU-sembleo (nepublika)	Katarzyna Lewończuk prezentas librojn eldonitajn en Słubice
17:45		IFEF Faka Komisiono I
18:00		
18:15		

<https://www.esperanto.de/de/enhavo/reta-programo-virtuelles-programm>

Malfermo de la kongreso. Heinz Spick prezentas la kongresan programon.

La virtuala kongresejo estis dividita en plurajn salonojn. La koncertoj kaj ĉefaj prelegoj okazis en la ĉefa salono kaj la ceteraj prelegoj en salonoj A, B kaj C. Oni povus eniri virtualan kafejon kaj paroli libere kun esperantistoj. Interesa parto de la kongresa programo estis tri prelegoj de Internacia Kongresa Universitato prezentitaj de: Amri Wandel el Israelo, Ida Stria el Pollando kaj Anna Striganowa el Rusio. Ankaŭ la fervojistoj de IFEF preparis siajn interesajn prelegojn. Meze de ĉiu tago, entute ĉirkaŭ 10 horojn, kongresaj prelegoj okazis samtempe en tri salonoj.

La ideo de komunaj Germanaj-olaj- kongresoj ne estas nova. De la 25-a ĝis 28-a de majo de 2012 ĉirkaŭ Pentekosto, kiun sekvas en Germanio ŝtataj ferioj, okazis en Berlino la Komuna Esperanto-Kongreso de la dana, germana kaj pola Esperanto-asocioj, al kiu venis entute 255 partoprenantoj el 18 landoj. La kongreso estis samtempe la 89-a Germana Esperanto-Kongreso, kiu same kiel kelkaj antaŭaj okazis kunlabore kun najbara landa

asocio por igi la kongreson pli interesa, allogi pli da partoprenantoj kaj pligrandigi la eblecojn praktiki Esperanton.

La kongreso finiĝis lunde per diskuto "Ĉu indas organizi virtualajn Esperanto-kongresojn? La ĝenerala konkludo estis „Jes, valoras ĝin organizi”. La nova formo de renkontiĝoj estas malfacila kaj kvankam dum ĝi mankas persona kontakto kaj neforgesebla komunuma etoso, ĝi ofertas multe pli da eblecoj. Eble ĝi estas transira formo de hibridaj kongresoj kun esperantistoj kaj estas virtuala elsendo por homoj el aliaj mondopartoj, kiuj ne povas veni kaj ĉeesti persone.



Ulrich Brandenburg, prez. de kaj GEA Guido Brandenburg IFEF

Mi konsideras la kongreson sukcesa kaj interesa. La teknikaj problemoj de la programo ZOOM estis etaj kaj la germanaj esperantistoj, kiuj servis la programon, solvis ilin rapide kaj efike.

Ĉi tie mi ŝatus danki al ĉiujn esperantistojn pro partopreno en la Kongresa programo. Specialan dankon al esperantistoj el Bjalistoka Esperanto-Societo, kiuj preparis interesan parton de ĝia programo.

Ĝis revido dum la sekva Translima Esperanto-Kongreso!

## Eventoj

*Adam Wilkus*

### Denove sur Ĉantorio

Jen kelkaj vortoj kaj fotoj pri la montara renkontiĝo, kiun mi ĵus partoprenis. Ĉu ni kune partoprenu ĝin venontfoje? Se la ideo plaĉas al vi, bonvolu noti tion en via kalendaro kaj sciigi viajn geamikojn pri tiu ebleco.

Kiel kutime, dum la tria dimanĉo de junio (20.06.2021), post unujara paŭzo pro la pandemio de la kronviroza malsano, okazis la tradicia renkontiĝo de esperantistoj sur pinto "Granda Ĉantorio" (Velká Čantoryje, Czantoria Wielka) en Beskidy-montaro.

Denove estis bela, sunplena vetero. La renkontiĝon partoprenis sume ĉirkaŭ 30 samideanoj, kiuj venis el Slovakio, Ĉeĥio kaj Pollando. Mi el Krakovo kaj la samideano Maciek el Zakopane (apud Tatry-montaro) venis jam sabate, unue al la montara urbeto Wisła, ĉe kiu estas fontoj de la samnoma rivero, fluanta tra la tuta Pollando, interalie tra Krakovo, al la Balta Maro.



Ni supreniris la pinton "Granda Konuso" (Velký Stožek, Stožek Wielki), ĉe la ĉeĥa-pola landlimo, de kiu estas bona videbleco. Sciindas, ke ĉe la pinto funkcias montara rifuĝejo, kiu venontjare festos sian 100-jaran jubileon. Inter turistoj, kiujn ni renkontis tie, estis multaj knabinoj, kies kapoj estis dekoritaj per florkronoj. Ili intencis partopreni ĉi-semajnfinan noktan vagadon tra la montaro kaj festadon okaze de baldaŭa nokto de la Sankta Johano, la plej mallonga en la tuta jaro. Vidante survoje la foliojn de filiko mi estis scivolema, ĉu iu provos trovi ĝian floron, kiu laŭmite, floras unufoje jare, dum la somera solstico, kaj provizas ĝian trovinton la riĉeco kaj abundo.



Dimanĉe, ekde la frua mateno ni vagadis tra aliaj pintoj, interalie tra Soŝovo, ĝuante belan naturon. En la montaro situas la naturprotektata aero de Natura 2000 "Sileziaj Beskidoj" kaj la Naturezervejo de Ĉantorio. Ni ricevis bongustan matenmanĝon ĉe la pinto Cieŝlar, tiel nomata de la familia nomo de la lokaj montaranoj, kaj vagadis tra pintoj, kovritaj de arbaro kaj herbejoj. Post la longa marŝado, ni finfine ekvidis la turon, sur la pinto de Ĉantorio, kaj antaŭtagmeze ni atingis la ĉefan gastejon, kie estis okazanta la renkontiĝo.

Ni babilis kun partoprenantoj, gustumis bongustan malvarman bieron aŭ aliajn trinkaĵojn kaj lokajn pladojn. Kelkaj partoprenintoj aĉetis originalajn maskojn, bele desegnitajn per Esperanto-simboloj, kiuj limigas disvastigon de la virusa infekto, produktatajn de slovakaj esperantistoj kaj al la pinto kunportitajn de la pola samideano Aleksander.

Okazis interalie prezentado de fotoj kaj konkurso pri arboj, kiujn oni lernis rekoni laŭ la folioj, floroj, fruktoj, trunkoŝelo kaj aliaj trajtoj. Partoprenantoj, kiuj sukcesis trovi bonajn solvojn, ricevis kelkajn lastatempe eldonitajn numerojn de E-revuo kaj bombonojn, pakitajn en la verda papero, kiel premion.



Kune kun la ĉefa samideano Ladislav el Pardubice, kun kiu mi iam konatiĝis vintre, dum la renkontiĝo de montaraj vojaĝantoj apud Poludnica, kiu sabate ankaŭ venis al la pinto Granda Konuso, kaj kun aliaj partoprenantoj, ni ĝuis noveldonitan bildan ludon pri birdoj, dum kiu oni lernis iliajn nomojn en diversaj lingvoj.

La renkontiĝon ĉeestis multaj samideaninoj, interalie Renata kaj Jana el Slovakio, Libuše, Jana, Vlasta, Dana, Anna, Li el Ĉeĥio, Kasia kaj Wiesława el Pollando, sed kelkaj foriris pli frue, verŝajne por esplori aliajn vizitindajn lokojn ĉe la monto.

Plaĉis al mi tiu ĉi montara renkontiĝo kaj mi esperas ĝui la alian kun ebleco esplori la najbaran regionon helpe de slovakaj kaj ĉeĥaj samideanoj. Mi denove konatiĝis kun novaj samideanoj kaj mi estas kontenta pro la

etoso de la renkontiĝo kaj la ebleco vagadi tra montaro, ĉar ĝi donas al mi novajn fortojn kaj certigas sanon 😊

Kune kun la ĉefo samideano Zdenek, kiu ŝatas bicikli, kaj kun aliaj partoprenantoj, ni pridiskutis la eblecon esplori najbaran montaran regionon, ekzemple supreniri aŭ veni per telfero al la pinto Javorový, apud Oldřichovice, kaj poste, tra la urbo Třinec aŭ Nýdek, veni al Ĉantorio, kio povus okazi venontjare. Aŭ unu tagon antaŭ la ĉefa, dimanĉa renkontiĝo ni povus kune viziti la proksiman lokon Trojstyk, kie najbaras tri landlimoj de Slovakio, Ĉeĥio kaj Pollando, esplori vizitindajn lokojn kaj tranokti ie tie. Ĉu ankaŭvi ankaŭ ŝatus veni tien, se ni organizos plurtagan eventon?

Dum la renkontiĝo oni ĉiam prezentas diversajn programerojn kaj ni havas kelkajn ideojn pri novaj amuziĝoj, sed ni ĝojos, se vi ankaŭ povus kontribui kaj proponi iun programeron venontfoje.

Por konvene rigardi kelkajn fotojn pri la ĉi-jara renkontiĝo sur Ĉantorio iru al: <https://tinyurl.com/zuyzatkz>

---

<https://keli.sea-vroc.eu/>

## Kristana Kongreso (kadre de 70-a KELI-Kongreso) Legnica 8-15.08.2021

Post longa pripensado kaj diskutado la estraro de KELI kaj LKK decidis, ke nuntempaj kondiĉoj permesas organizi sekuran kongreson, se ni ĉiuj estos atentemaj, kunsentemaj kaj zorgos pri aliaj kunpartoprenantoj.

Ĝi okazos en la tagoj 7-14-aj de aŭgusto 2021 kaj ni esperas, ke la plejmulto de plifruaj aliĝintoj povos alveni al Legnica. Se vi ne volas, aŭ ne povas pro diversaj kialoj, ni petas, informu pri tio organizantojn.

Ni esperas al vi ĉiujn bonfarton kaj sanon ĝis la fino de ĉi tiu pandemio.

Bonvenon al Legnica – unu el la plej malnovaj kaj belaj urboj de Malsupra Silezio, kiu havas riĉan historion kaj nuntempe estas grava ekonomia, kultura kaj akademia centro en la regiono kaj Pollando

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj volas aktive pasigi tempon en kristana etoso.



Dum la kongreso, interalie, atendos vin la jenaj:

- komunaj preĝoj kaj diservoj
- komuna kantado kaj ludado
- prelegoj kaj diskutoj
- koncertoj
- ekskursoj por konatiĝi kun interesa ĉirkaŭaĵo



La favorsituo de la urbo en la centro de Malsupra Silezio ĉe la kruciĝo de eŭropaj transportaj vojoj estas tre grava por ĝia ekonomia kaj turisma disvolviĝo. Same gravas la proksimeco al Germanio kaj Ĉeĥio. Legnica kuŝas sur historiaj itineroj: cisterciana vojo kaj la komerc-pilgrima Reĝa Vojo (Via Regia) komenciĝanta en Portugalio kaj finanta en Ukrainio. Ankaŭ hodiaŭ la urbo estas grava komunikada krucvojo: vojo kun la aŭtoŝoseo A-4 (orienten-okcidenten) kaj nacia vojo n-ro 3 (norden-suden kaj fervojo Wrocław-Dresden (Vroclavo- Drezdeno)). Pro tio la urbo estas facile atingebla de Vroclavo per trajno, kiu iras ĉiun unu horon aŭ eĉ pli ofte aŭ de la okcidenta ĉelima urbo Zgorzelec/Görlitz.

La kongresejo estos la Alta Porpastra Seminario en Legnica.

Bonvolu viziti la retejon: <https://keli.sea-vroc.eu/> aŭ skribu al Teresa Pomorska: [pomer@wp.pl](mailto:pomer@wp.pl).

## Ĝis JES nur kvin monatoj!

Ni jam anoncis ke la Junulara Esperanto-Semajno 2021/22 okazos en Wittenberg en Germanio. Wittenberg la “Luther-urbo”, troviĝas en orienta Germanio, inter Berlino kaj Lepsiko. Ĝi estas ege konata pro sia ĉefa preĝejo, al kies pordo onidire Martin Luther alnajlis siajn 95 tezojn dum la reformacio.

Pro tio multaj vidindaĵoj en la urbo rilatas al Martin Luther, oni povas ekzemple viziti la loĝdomojn de li kaj aliaj reformistoj. Sed ankaŭ ekzistas malnova kastelo kaj lernejo konstruita laŭ planoj de la konata arĥitekto Friedensreich Hundertwasser.

La JES-ejo situas meze de la historia malnova urbo, do vi povos facile promeni tra la urbo kaj ekkoni la vidindaĵojn.

Ankaŭ en tiu ĉi jaro ni preparos por vi riĉan kaj buntan programon – kun koncertoj, artaj prezentaĵoj, ekskursoj, Esperanto-kursoj kaj multe pli! Aparta programo por novuloj certigos, ke vi sentos vin bone, ankaŭ se vi ne jam konas multe da homoj aŭ se tiu ĉi estas via unua aranĝo!

### **Kiel aspektas “kutima” tago dum JES?**

Kutima tago?! Ne ekzistas kutima tago! Ĉiu tago estas unikaĵo... tamen ekzistas ĝenerala strukturo de la tago, kiu ripetiĝas. Dum la tago okazas ekzemple prelegoj, ludoj, dancado kaj manlaboro. La tagan programon ĉefe okazigas la partoprenantoj mem – do se vi havas interesan ideon, ne hezitu malkaŝi vian proponon al ni en la aliĝilo!

8h00 – 10h00 matenmanĝo

taga programo

13h00 – 15h00 tagmanĝo

taga programo

18h00 – 20h00 vespermanĝo

En la vespera programo vi trovos ekzemple koncertojn, sed ankaŭ tradiciajn programerojn kiel la interkonan vesperon, la trinkomanĝan nokton, la silvestran balon kaj la internacian vesperon.

21h00 vespera programo

Kaj tio ne estas ĉio. Post la “oficiala” vespera programo estas tempo por plue “maldormi” – en la drinkejo, gufujo aŭ diskejo.

Estu (kaj restu) en kontakto kun ni!

Se vi havas demandojn, rimarkojn, proponojn aŭ simple ion alian interesan por diri al ni, kontaktu nin prefere retroŝte per la adreso [jes2021@esperanto.de](mailto:jes2021@esperanto.de).

Ni ankaŭ ekzistas en Telegramo kaj Facebook!

## Raportoj, rakontoj

*Jagoda Greger*

### Vojaĝo al Taŝkento

Mi volas rakonti al vi pri mia plej ekzotika kaj surpriza ekskurso, kiun mi travivis dank' al Esperanto. En la jaro 1974 mi partoprenis en la unua vojaĝo por la grupo de polaj esperantistoj al Centra Azio, kiun organizis Turisma Oficejo Juventur en Bydgoszcz. Ĝia direktoro estis Andreo Grzębowski – konata esperantisto, kiu eksperimente komencis utiligadon de Esperanto en la profesia turismo. Itinerojn kaj programojn por la turistaj vojaĝoj li kreis kontaktigante kun esperantistoj en diversaj landoj. La veturantaj polaj turistoj havis la eblecon dumvoje rekontiĝi kun lokaj esperantistaj grupoj. Daŭrigante sukceson de tiu eksperimento A. Grzębowski organizis apartan turistan oficejon - Esperantotur.



Taŝkento en 1974

Nia itinero estis jena: Moskvo – Frunze - Samarkando – Buĥaro - Taŝkento. Esperantistoj atendis nin en Samarkando. Ni distriĝis kun ili en iu restoracio.



Plej impresis min **Buĥaro**, oazo sur la Silka Vojo, la urbo meze de la dezerto Kyziul-Kum. La Buĥara Provinco, kiun mi vizitis antaŭ 47 jaroj, jam ne ekzistas, ne ekzistas jam ankaŭ la tuta Sovet-Unio. Mi provis orientiĝi, kiom mi memoras post tiom da jaroj, kiam mankas tiam faritaj fotografaĵoj. Mi ne memoras famajn islamajn monumentojn de la Centra Azio, tiam ankoraŭ ne rekonstruitaj.

Nun mi scias, ke en Buĥaro troviĝas renovigitaj 150 moskeoj, Medresoj, maŭzoleoj ktp.

En mia memoro restis nur kontrasto inter la sovetia „grandiozo” kaj la videblaj realaĵoj.

Pri la 2-miljara historio de Buĥaro oni povas legi en interreto, mi nur volus rimarkigi, kian rezulton havis la fakto, ke vole-ne-vole Uzbekio, en la jaro 1920, fariĝis Soveta Respubliko.

Unuflanke sovetoj multe detruis la tradician vivmanieron de la nacioj, loĝantaj en Uzbekio, provante ekstermi islamon, lokajn lingvojn kaj ŝanĝi la tradician rolon de virinoj.

Aliflanke sovetoj enkondukis egalajn rajtojn, kaŭzis disvolviĝon de industrio kaj agrikulturo (kvankam, bedaŭrinde, ĉefe bazita sur la kotona monokulturo). Komunistoj komencis ankaŭ la rekonstruon de la plej grandiozaj post-timuridaj monumentoj.

Bedaŭrinde, la samaj komunistoj ŝanĝis la limojn de la mezaziaj respublikoj sen atenti teritoriajn, historiajn kaj etnajn rilatojn.

Ni alvenis aviadile al Buĥaro kaj ekloĝis en la malnova medreso (korana lernejo)

Mi bone memoras nur la internon de tiu nia hotelo kaj la loĝkondiĉojn.

Unupersonaj ĉambretoj (ĉeloj) estis sen mebloj. Interne estis nur la brika “katafalko” kun litaĵoj. La solan pordegon gardis ulo kun pafilo.

En la objekto mankis necesejo kaj akvo por lavi sin. Sur la bela korto, en kvar anguloj, eblis nur lavi manojn ĉe la artifa ujo, fermata per najlo. La urba necesejo estis verdire neuzebla (malhela labirinto kun truo ĉe la fino).

Savis nin manĝejo, kiun ni vizitadis trifoje tage. La necesejo tie estis same terura, sed sen labirinto.

Nia loka gvidanto realigis politike korektan programon. En la moskeo, kiun ni vizitis, troviĝis la Muzeo de Komunismo. Sekrete ni eksciis, ke en Buĥaro funkcias, kiel religia objekto, nur tiu unusola moskeo. Kompreneble, ni tuj decidis viziti ĝin (sen gvidanto). Neniu gardis la enirejon, do ni haltis ĉe la ejo, kie sonoris telefono. Certe iu tuj venos – ni pensis. La telefono sonoris vane, eble 10-15 min. Ĝuste tiam, kiam la telefono ĉesis brui, venis imamo kaj diris, ke ĉiutage, kiam ili komencas tradician preĝon al Alaho, “ili” tiamaniere provas ĝeni fidelajn islamanojn.

Dum la tritaga restado, ni havis la eblecon viziti ekstere la plej malnovan antikvaĵon en Buĥaro – la Maŭzoleon de Samanides el la 10-a jc. La citadelon Ark - “Urbon en la urbo” el la 12-a jc ruinigitan en 1920, la 19-

jarcentan Someran Palacon de la lasta Emiro kaj la dezerton Kyzyl-Kum, por rajdi sur kamelo kaj azeno.

Mozaiko en Taŝkento



Rilatoj kun loĝantoj ne povis okazi. La loka vivo rimarkeblis en la malnova centro, ĉe lageto. Tie situis “ĉajhano” por viroj, kiuj trinkis verdan teon, kuŝante sur lignaj kanapoj kaj interparolante en la uzbeka lingvo. Nia grupa societa vivo okazis nur vespere, en nia medreso. Estis gaje dank’ al la loka alkoholaĵo, kiun certigis nia loka gvidanto. Tio estis mirinda alkoholaĵo, ĉar la sekvontan tagon, post la gustumado, ne

aperadis kapdoloro.

En Buĥaro, hazarde, ni renkontis du loĝantaj tie polinojn. La unua polino vendadis glaciaĵojn en bazaro kaj la dua, pli juna, laboris en manĝejo. La unuan tagon ŝi demandis, ĉu ni portos ŝian leteron al Pollando, al ŝia familio. Ĝis la fino de nia restado ŝi ne plu alvenis al la laboro.

Simila situacio okazis en la studenta domo en Samarkando. Studentoj, kiuj entuziasme kontaktiĝis kun nia grupo (ili volis aĉeti ĉion eblan), malaperis kaj ni ekscis, ke „ili” venis kaj forprenis studentojn. Ni estis gardataj.

Uzbekio estis unu el la lokoj, kien la cara reĝimo sendis polojn post la polaj Ribeloj de Novembro (1831) kaj Januaro (1863) kaj post la sovetia invado al Pollando, en 1939. Granda parto de ĉi-lastata grupo forlasis Uzbekion en 1941, forirante al Irano kun la armeo de generalo W. Anders. Malmultaj poloj restis en Uzbekio, pro la malbona sano aŭ familiaj cirkonstancoj.

Nun Samarkando, Buĥaro kaj la ĉefurbo de Uzbekio - Taŝkento estas renovigitaj, modernaj, plenaj de turistoj. Ne estas problemoj kun necesejoj. Tamen, la tradicia kulturo restis. Mi legis, ke maljuna uzbeko ne volis manpreni dankeman eksterlandaninon. Li ne kutimas tuŝi virinojn, „ĉar ili estas malpuraj”. Do, ekzotiko restis, eble ne tiel videbla kiel antaŭe.

Antaŭ la vojaĝo valoras konatiĝi kun tre riĉa historio de la regiono, kun priskribo de renovigitaj monumentoj. Mi volonte vizitus denove Buĥaron.

Aldone, kun ĝojo, mi povas informi, ke esperantistoj el Samarkando plue agas kaj i.a. utiligas Esperanton, invitante eksterlanajn samideanojn komune salutfesti la Tagon de la Urbo. Mi mem sendis la salutojn, je la nomo de esperantistoj el la Triurbo al la samarkanda komunumo.

---

*Małgorzata Komarnicka*

## Ni ŝparu akvon

Ekde 1993 la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj decidis, ke ĉiujare, la 22-an de marto estos festata la Monda Akvotago. La ĉefa celo de tiu internacia tago estas konsciigo, kiel grava estas laŭregula mastrumado de akvo, kiel urĝa estas solvo de tutmonda akva krizo, sed ankaŭ kion signifas akvo por homoj kaj kia estas ĝia vera valoro.



Akvo estas nia komuna bono. Manko kaj defcito de akvo kaj ankaŭ malplibonigado de ĝia kvalito estas unu el la plej gravaj problemoj de la hodiaŭa mondo. Ekonomia kaj demografia evoluo de la mondo pligrandigas bezonon pri akvo kaj tio postulas pli bonan kaj komunan protekton de la medio, sed ankaŭ amikajn rilatojn inter civitoj. Feliĉe, dum la lastaj kelkdekoj da jaroj akvo pli ofte kunigis ol disigis.

Akvo havas grandan signifon en nia planedo kaj estas ĉieestanta. Ni konsistas en 2/3 el akvo kaj 3/4 de la surfaco de la terglobo estas akvo. Sen akvo ne ekzistus vivo en la terglobo kaj, ĉar ĝiaj akvoprovizoj konstante malgrandiĝas, tial ni devas racie eluzi ĝin. Ĉiutage, uzante akvon, ni pensu pri tio, sed ankaŭ pri sekaj regionoj de la mondo.

Laste, en la Pola Televido estas prezentata bela reklamo, en kiu oni informas, ke por produkti nur unu kotonan T-ĉemizon oni bezonas uzi 2,5 mil litrojn da akvo kaj por produkti ĵinsojn eĉ 8 mil litrojn. Ĉu vi scipovas kalkuli, kiom da akvo uzadas la tuta vestara branĉo? Akvon uzas ankaŭ aliaj branĉoj de industrio, komunuma ekonomio aŭ arbarkultivo kaj terkultivo. Tio jam estas trilionoj... Kaj tio havas grandan influon al nia medio.

En unu jaro homo, por vivi, bezonas ĉ. 42 mil litrojn da akvo. Por produkti novajn vestojn, oni uzas multe pli da akvo kaj do antaŭ ol decidi aĉeton de nova T-ĉemizon, ni haltu kaj pripensu! Ni memoru, ke nur negranda procento de tekstaĵo en la mondo estas recikligata! Ni aĉetu malpli da vestoj, ni riparu, refaru kaj denove ni ilin uzu aŭ, ni redonu al bezonantoj, anstataŭ ilin forĵetadi.



Tre grava afero estas malpurigo de akvo. Tio rilatas precipe landojn kie oni produktas kaj tinkturas vestojn. Eluzata akvo por la produkto estas toksika, ĉar ĝi enhavas, interalie, hidrargon, kromon, plumbon kaj arsenon. Ĉi tiu akvo trovas vojon rekte al riveroj kaj ĝi estas tre malutila por akva vivo kaj por homoj. Tial oni devas kiel eble plej rapide fariĝi konscia konsumanto kaj do konscie aĉeti kaj flegi vestojn. Ĉiu el ni havas senperan kaj peran influon al ŝparado de akvo: la senperan, se ekz. ni lavas, purigas dentojn, razas kaj la peran, se ni aĉetas kaj ne konsideras, kiom da akvo estas bezonata por produkti kaj transporti objekton ...

Ŝparado de akvo estas ne nur produktado kaj aĉetado de vestoj, sed ankaŭ produktado de nutraĵo – ĉiu ĝia etapo postulas akvon. Por produkti unu kilogramon da bovaĵo, oni bezonas 14 500 litrojn da akvo, unu taso da teo bezonas 30 litrojn da akvo kaj kafo jam 140 litrojn.

Ni estu konsciaj civitanoj de nia bela tero. Ni entreprenu prudentajn agojn kaj ni ne estu indiferentaj pri ĝia sorto. Ni memoru, ke ni estas ĝiaj infanoj kaj ne posedantoj.

---

*Irena Solarek kaj Teresa Sibilak*

## Kijivo – virtuale kaj kun belaj travivaĵoj

Maje, malgraŭ la pandemio, studentinoj de la Esperanto-kurso, kiun organizis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado en Wrocław, vizitis Kijivon. Małgosia Komarnicka, kiu gvidas la kurson, interkonsentis kun Svetlana Pogorelaja, la ukraina esperantistino, du virtualajn ekskursojn. La kursantinoj, dank' al Svetlana, sidante komforte kaj sekure hejme, admiris ĉarmojn de la ĉefurbo de Ukraino, vizitante la arbaran kampon de tulipoj kaj antikvan vilaĝon en la centro de Kijivo.

---

Lunde, la 10-an de majo, la studentinoj vizitis la arbaran kampon de tulipoj, kie kreskas ĉirkaŭ miliono da tulipaj floroj. Ili admiris diversajn, belegajn florbedojn, plenajn de diverskoloraj tulipoj: ruĝaj, tre malhelruĝaj, flavaj, rozkoloraj, violkoloraj, oranĝkoloraj, blankaj, dukoloraj – flavaj-ruĝaj. Iuj tulipoj similis peoniojn, aliaj aspektis kiel rozoj, ankoraŭ aliaj aspektis kiel papavoj kaj eĉ kiel lilioj. Tamen, la plej belaj tulipoj estis verdruĝaj – Esperanto-tulipoj. La tulipo "Esperanto" estis kreita en Nederlando kaj ricevis sian nomon en 1994. Ĝi floras dum multe pli longa periodo ol aliaj tulipoj. Ĝi estas bela, ruĝa kiel amo, kaj verda kiel la Esperanta flago.

En ĉi tiu parko polinoj admiris ne nur tulipojn, sed ankaŭ diversajn (verdkolorajn, do Esperantajn) bestojn, faritaj el la nenatura herbo. Estis tie, interalie, dinosaŭroj, leporoj, sciuroj, bovoj, ĉevaloj, elefantoj, mamutoj, simioj, ĝirafoj, kanguruoj, lupoj. Sub la originala, artefarita arbo kreskis diverskoloraj sovaĝaj tulipoj: grandaj, tre grandaj, malgrandaj, tre malgrandaj, altaj, tre altaj, malaltaj kaj tre malaltaj.

Lunde, la 3-an de majo, la studentinoj havis la eblecon ekvidi specifan lokon, la originalan ukrainan vilaĝon en la centro de Kijivo. Ĝi troviĝas

apenaŭ 7 km for de la ĉefa strato, kaj do preskaŭ en la centro de la urbo. La teritorio de la vilaĝo okupas ĉirkaŭ 10 hektarojn kaj ĝi estis kreita tiel, ke ĉiu vizitanto sentu sin kvazaŭ li troviĝas en vera, malnova vilaĝo. Oficiale tiu vilaĝo nomiĝas "**Mamajeva Sloboda**", tio signifas "vilaĝeto de la kozako Mamaj". La nomo estas hazarda, tio ne estas vera vilaĝo. Ĝi estas kleriga muzeo.



En ĉi tiu vilaĝo la dometoj estas specifaj, malaltaj, malnovaj, kun pajlaj tegmentoj kaj kun etaj fenestroj. Ĉiu el ili reprezentas konkretan posedanton, ekzemple, forĝiston, mueliston. La eniro al la korto de ĉiu dometo estas malsama, kun lignaj figuretoj simbolantaj la profesiojn de la mastroj. Ankaŭ malsamaj estas bariloj de tiuj dometoj kaj la benkoj ĉe ili. En la kortoj staras diversaj lignaj veturiloj kaj apud la dometoj kreskas multe da fruktaj arboj: ĉerizoj, piroj, pomoj. Floras floroj: iridoj, rozoj, siringoj, jasmenoj. En ĉi tiu vilaĝo estas ankaŭ hejmaj bestoj, kokoj, kokinoj, anseroj, kaprinoj, ŝafoj. Kiam la vetero estas bona, ili libere vagadas, eblas ilin karesi kaj eĉ nutri. Kiam la vetero estas malbona, ili restas en siaj dometoj. Estas ankaŭ bovoj, sed ili ne promenis libere. Ili manĝas herbon malantaŭ barilo. Unu bovo eĉ manĝis herbon el la mano de Svetlana.

En ĉi tiu originala vilaĝo-muzeo troviĝas ankaŭ ligna preĝejo, al kiu kondukas originala ŝtuparo. Apud la preĝejo estas belega ĝardeno de rozoj. En la vilaĝo estas ankaŭ muelejoj, venta kaj akva, placo por bazaroj kaj restoracio, la loko, kie oni povas manĝi. En la restoracio mankas lampoj. La internon lumigas kandeloj. La kelnerinoj estas vestitaj per belaj, ukrainaj popolaj vestoj. Antaŭ la restoracio staras malnovtipaj, lignaj tabloj kaj benkoj kaj malantaŭ ili, sur ŝnuroj, pendas multaj broditaj tukoj. Apude kuŝas ripozante anseroj.

Sur la vilaĝa placo troviĝas speciala forno, kiu estas uzata somere por prepari manĝaĵojn por la vizitantoj de la vilaĝo. Svetlana diris, ke tie, dum la antaŭkvarantenaj jaroj, okazis diversaj aranĝoj: festoj, koncertoj. Sed nun, pro la kvaranteno, neniu aranĝoj okazas.



Virtuala promeno, tra la specifaj lokoj de Kijivo, permesis pasi al la studentinoj de la Esperanto-kurso agrablajn momentojn, promeni inter verdaĵoj, admiri belegajn tulipojn, rigardi la hejmajn bestojn, aŭskulti birdojn kaj senti sin kiel en la vera, malnova vilaĝo. La studentinoj decidis organizi ekskurson al Kijivo, kiam finiĝos la pandemia tempo, por persone ekkoni Svetlanan kaj aliajn lokajn esperantistojn.

## Pri kio ni aŭdas

*Bert Boon*, Internacia Esperanto-Arkivo

### Internacia Esperanto-Arkivo

Estimataj gekolegoj!

Antaŭ nelonge en Belgio estis laŭleĝe lanĉita nova projekto por protekti mondwide kaj konservi por ĉiam librajn, revuajn kaj alispaciajn Esperantajn heredaĵojn. En la nomo de Internacia Esperanto-Arkivo mi afable petas vin disvatigi per via revuo la aldonitan informcelan artikolon. IEA proponas al via fakgrupo kroman servon. Se vi unuafoje jare povus sendi al nia poŝtadreso kompletan jarkolekton de via bulteno, ni povus deponi la dokumentojn en la internacia arkivo. Jen la adreso:

Internacia Esperanto-Arkivo Ĉe Marc Vanden Bempt, Arnoudt Rulenslaan 10, 3020 WINKSELE, Belgio. Kromkrome jen la Katalogo de IEA kun mankolistoj. Vi povus helpi nin kompletigi la kolekton de via bulteno.

<http://www.iespa.eu/docs/Katalogo-Revuoj.pdf>

Kun antaŭdanko kaj altestime,

Bert Boon, koresponda peranto de IEA, bert.boon@skynet.be

*Paweł Dzienis*

### Marŝalo en la suna vilaĝo

Mi rakontos pri Paproć Duża (Filiko Granda), eksterordinara vilaĝo en la komunumo Szumowo. La komunumo estas situanta rande de la arbara komplekso Czerwony Bór (Ruĝa Arbaro) en la distrikto de Zambrów en la podlaĥia vojevodio. La vilaĝo distingiĝas ĉefe per interesa arkitektura formo, sed ne nur per ĝi. La vilaĝon oni konstruis laŭ la formo de la suno. Por rapide tion ekvidi, rigardu la mapon aŭ aviadilan foton de Paproć Duża. Tuj ekestas la demando, kial tia originala aranĝo apreis ĉe la limo de Podlaĥio kaj Mazovio. Multkultura Podlaĥio ofertas la respondon.



#### La sunplano

La arkitektura koncepto de Paproć Duża konsistas el cirklo kun ĉirkaŭ 300-metra diametro kun 9 stratoj, kondukantaj al ĉiuj direktoj, en formo de sunradioj. La perimetro de la cirkla strato longas 1,7 km. Ĝi ne estas grandega, tipa trafikcirklo, tamen ĝi foje estas nomata la plej granda trafikcirklo en Eŭropo. En la centro de la stratcirklo situas brika preĝejo. Ĉi

tiu vilaĝaranĝo aspektas plej bone el la birda perspektivo, sed ĝi estas ankaŭ interesa por preterpasanto.

### **Pruslandaj komencoj**

La vilaĝon fondis germanaj setlantoj fine de 18-a jarcento en la loko kovrita per arbaroj. Tiutempe ĝi nomiĝis Gross Königshuld (Granda Reĝa Graco). Post la tria disdivido de Pollando-Litovio 1795), ĉi tiu tereno troviĝis sub la regado de Prusio. Vilaĝa, eksterordinara plano estis ŝablona, geometria germana projekto. Similaj spacaj aranĝoj troveblas ekzemple en la germana Karlsruhe. Ĝi aludas al baroka „stela ŝablono”, kiu prezentis la koncepton de ideala urbo. Komence ekloĝis en la vilaĝo 68 germanaj familioj. Ili venis el Brandenburgio, Makleburgo, Virtembergo kaj Pomerio. Poste aperis ankaŭ miksitaj polaj-germanaj familoj. La kolonianoj vivis en Paproć Duża ĝis la fino de la Dua Mondmilito.

### **Pola historio**

La vilaĝo Paproć Duża estas fama ne nur pro sia nekutima arkitektura projekto, sed ankaŭ pro sia politika kaj ama historio. En la tiama evangeliana kirko (ekzistanta ĝis la 60-aj jaroj) la 15-an de julio 1899 je la 10-a horo okazis tiel nomata „geedziĝo de konspirantoj”. Józef Piłsudski (posta pola marŝalo) geedziĝis kun Maria Juszkiewiczowa de Kopalewska. La geedziĝan ceremonion celebris pastro Kacper Mikulski. La 31-aĝa fianĉo, kaj 33-aĝa virino devis ŝanĝi sian religion al luteranismo. ĉar ili ne povis geedziĝi laŭ la romkatolika rito. La fratoj de Józef - Johano kaj Adamo partoprenis la ceremonion kiel atestantoj. La elekto de Paproć Duża por la geedziĝo ne estis hazarda, ne nur pro religiaj kialoj, sed ankaŭ pro la sekreta agado de la gefianĉoj. En la antaŭgeedziĝaj anoncoj estis prezentitaj falsaj loĝlokoj de la geedzoj kaj la falsa profesio de la fianĉo. Ili ambaŭ aktive agis en politika konspiro. Tiutempe la podlaĥia regiono apartenis al la Rusujo kaj geedziĝo en malgranda vilaĝo estis pli sekura ol geedziĝo en urbo.

En Paproć Duża polan historion memorigas ankaŭ la amastombo en la formo de monumento, dediĉita al la junaj soldatoj de la Volontula Armeo, kiuj pereis sur la proksimaj kampoj la 4-an de aŭgusto 1920, dum la Pola-Bolŝevika Milito (1919-1920). Ĝi havas la formon de ŝutmonteto kun ligna kruco sur la pinto. Ĝi altiĝis ĝis alteco de 12 metroj en 1926. La ligna kruco estis renovigita en 2018. Nun prizorgas ĉi tiun lokon lernantoj de la loka bazlernejo.

La Volontula Armeo estis nekutima formacio de la Pola Armeo, nomata junulara regimento, formita en julio 1920. La 201-a Volontula Infanteria Regimento, batalanta en podlaĥia regiono konsistis el soldatoj el la tuta

Pollando, ĉefe lernantoj, skoltoj kaj studentoj. Ili respondis al la alvoko de la generalo Józef Haller, kiu en la plej danĝera momento de la milito formis novan armeon. Inter la mortintaj soldatoj estis William Beyer (poligloto, tradukisto, vojaĝanto, patrioto, elektita por la pola nacia teamo por la olimpikoj kiel bonega skermisto). En 2017, dum la elfosaj laboroj, sur la batalekampo estis trovitaj tomboj de 10 pliaj soldatoj. Iliaj restaĵoj estis solene entombigitaj en la tombejo en Szumowo printempe de 2018. En la vilaĝo kreskas memorkverko pri Katyń.

### Paproc Duża hodiaŭ

Hodiaŭ en Paproc Duża loĝas ĉirkaŭ 400 personoj. En la jaroj 1994-1998, en la centro de la ronda strato, oni konstruis novan, romkatolikan preĝejon. Ĝia formo intence ligiĝas al malkonstruita kirko en la 1960-aj jaroj. La novan sanktejon oni projektis laŭ la savita, ununura foto de la

malnova preĝejo kaj priskriboj de loĝantoj, kiuj memoras la malnovan kirkon. La nova, romkatolika preĝejo, dediĉita al la Dia Mizerikordo, apartenas al la proksima paroĥejo en Andrzejewo. Ĝi estis konstruita el ruĝaj brikoj kun alta, kaj dika prisma turo, kiu estas la centra punkto de la vilaĝo, situanta laŭ la sunplano.



La florkrono el la "Prezidenta Rikoltfestoj" farita de „Filiketinoj”

Ekzistas interesa legendo, ligita kun ĝia reconstruo. Ĝi rakontas ke post la malkonstruo de la kirko, malbeno falis sur la vilaĝon. Laŭ la legendo, post mallumiĝo aperis ĝemaj meleagroj sen okuloj. La konjekto anoncas, ke tio estis puno pro

detruado de la kirko. Post kiam la nova preĝejo estis konsekrita, la fantomaj meleagroj malaperis.


La loka lernejo, portanta la nomon de Józef Piłsudski, ankaŭ memorigas la geedziĝon de la Marŝalo. La busto de Józef Piłsudski troviĝas

antaŭ la lerneja konstruaĵo. En julio 2020, laŭ la iniciato de virinoj el la Rondo de Kamparaj Dommastrinoj "Paprotki" („Filiketinoj”), estis malfermita en la vilaĝo la Memorĉambro, dediĉita al Józef Piłsudski.



Vi povas vidi tie, inter aliaj eksponaĵoj, pecojn de uniformoj de soldatoj, mortinaj apud la vilaĝo kaj trovitaj en 2017, en la proksimaj kampoj. Estis publikigita libro pri la batalo kaj mortintaj soldatoj. En 2018, en la jaro de la centjariĝo de sendependiĝo de Pollando, „Paprotki” reprezentis Podlaĥion dum la "Prezidenta Rikoltfestoj" en Spaña kaj ricevis distingon, pro rikolta florkrono, inspirita per sunformo.

Maria Piłsudska (de domo Koplewska) kaj Józef Piłsudski en 1899



### Vizitu la vilaĝon laŭ la sunplano

Vizitindas Paproć Duża por serĉi spurojn de la historio kaj rigardi la sunan vilaĝon de la tera kaj birda perspektivoj. Indas vojaĝi aŭte aŭ bicikle, por promeni sur la sunplano, memorante pri la loka historio, ofte tre interesa en la multkultura Podlaĥio. Indas fari interesajn fotojn per droneo. Paproć Duża estas suna vilaĝo, kie la suno ĉiam brilas, ĉar ĝi situas sur la sunplano.

## Homoj

*Ulrich Lins*, “Beletra Almanako” n-ro 38

### Izrael Lejzerowicz - radikala esperantisto – la 2-a parto

La 11-an de majo 1933, do nur iom pli ol tri monatojn post la ekrego de Hitler, la nazioj aranĝis publikan bruligadon de libroj. Tio estis nur unu el multaj atestoj pri la netoleremo, persekutado kaj malindulgo, sed Lejzerowicz elstarigas la aŭtodafeon kiel tipan por la karaktero de la hitlera reĝimo, kiel kruele senvualigan.



En *Literatura Mondo* li, sub la titolo “Sangaj ludoj”<sup>1</sup> parolas pri “fajro vandala”, historie tute senprecedenca. Por Lejzerowicz la bruligado de libroj de Heine, Lessing, Thomas Mann kaj Einstein superas la mezepokan inkvizicion, ĉar tiu bruligis individuajn homojn, dum ĉi-foje temas pri nenio alia ol bruligo de la homaro reprezentata per siaj geniuloj. En la koleron kaj furiozon de Lejzerowicz miksiĝas amaraj sentoj pro tio, ke la esperantistoj kiel kultura movado plejparte silentas pri tiu “barbara atenco al la libro”, kaŝante sin malantaŭ la neŭtraleco. Tion Lejzerowicz rifuzas akcepti. Li emfazas, ke li parolas ne kiel judo, sed kiel “esperantisto, fiera disĉiplo de la Majstro Zamenhof [...], pretendanto al homeco”.

Por Lejzerowicz estis nature, ke esperantistoj devas protesti kontraŭ la bruligado de libroj. Tial li kontraŭis, ke daŭru la preparlaboroj por Universala Kongreso en Kolonjo, la 25-a UK. Tiuj komenciĝis en 1932 kun la apogo de la tiutempa ĉefurbestro Konrad Adenauer. Lin la nazioj eksigis el la ofico. La germanaj esperantistoj sciis, ke la nazioj malamegas ilian movadon, kaj tial dum iom da tempo timis, ke la UK ne povos okazi. Sed la reĝimo, ankoraŭ iom zorgema pri sia internacia reputacio, preferis ne malpermesi ĝin. La preparoj do pluiris, kvankam, precipe ekster Germanio, leviĝis voĉoj, pledantaj por transigo de la UK al alia lando.



Tiuj pledoj kutime sin bazis sur la raportoj pri naziaj kruelaĵoj kontraŭ komunistoj kaj judoj kaj konklude avertis, ke la kongresanoj ne estos sekuraj en Germanio. Kontraŭajn argumentojn – pledantajn por la okazigo de la Kolonja Kongreso – plej energie uzadis *Heroldo de Esperanto*, kiu tiam aperis ĝuste en Kolonjo. Ĝia ĉefredaktoro Teo Jung (1892-1986) ne rekte neis, ke en Germanio okazas maltrankviligaj eventoj, sed bagateligis ilin por apelaci al la esperantistoj, ke ili grandnombre aliĝu al la UK.

Kontraŭ la pozicio de *Heroldo* Lejzerowicz tre forte protestis. Li deklaras, ke vera esperantisto ne povas partopreni kongreson “en la lando, kies agoj, bedaŭrinde, neas ĉiun kulturon kaj plej primitivajn homecajn rajtojn”. Lejzerowicz skribis tion en la ĉefartikolo en *Pola Esperantisto*, sub la titolo “Interna ideo kaj neŭtraleco”<sup>2</sup>. Li koncedis, ke la oficiala movado ne povas miksi sin en aferojn de politiko kaj ankaŭ ne povas kondamni la faŝismon aŭ la komunismon. En tiu senco li defendis la tradician neŭtralecon. Sed samtempe li atentigis pri la interligiteco de neŭtraleco kaj interna ideo. Memorigante pri la modelo de Zamenhof, kiu publike, en kongresoj, kondamnis la kontraŭjudajn pogromojn en Ruslando kaj ĉian ŝovinismon, li rifuzis sekvi neŭtralecon vid-al-vide de aktualaj

<sup>1</sup> I. Lejzerowicz, “Sangaj ludoj”, *Literatura Mondo* II, 3. 1933, n-ro 5, p. 76-77.

<sup>2</sup> I. Lejzerowicz, “Interna ideo kaj neŭtraleco”, *Pola Esperantisto* 27. 1933, n-ro 7, p. 97-99.

kontraŭhomaraj, barbaraj agoj. Ĉar la movado finfine “ne estas butikoj, kiu vendas sole Esperanton”, sed estas ligita kun domoj kaj kulturo, ĝi ne povas resti neŭtrala “rilate al banditismo”. Lejzerowicz kontraŭmetis al la kutime observata, laŭ li negativa neŭtraleco la principon de “pozitiva neŭtraleco”, bazita sur la interna ideo.

Klaraj vortoj. Pli da pezo donis al ili la Kongreso de Polaj Esperantistoj, kiu komence de junio 1933 en Varsovio akceptis, certe sub influo de Lejzerowicz, rezolucion, ke la UK en Kolonjo “ne povos esti de Poloj vizitata”<sup>3</sup>.

La Kolonja Kongreso okazis, kun malpli da partoprenantoj ol atendite, ankaŭ kun hokokrucaj flagoj kaj parolado de la nova, nazia ĉefurbestro. Post ĝi Lejzerowicz ankoraŭ pliakrigis la tonon. Li parolis pri “dolora ofendo al la ideo esperantismo” kaj kulpigis la Internacian Centran Komitaton, la plej altan instancon de la movado, ke ĝi perfidis “la altajn idealojn Zamenhofajn por eviti la koleron de la Tria Regno”. Lejzerowicz substrekis, ke inter kulturo kaj barbareco ne eblas kompromiso. Ni iom pli longe citu el tiu artikolo, ĉar ĝi aparte ilustras la penson kaj lingvaĵon de Lejzerowicz:

“Se tamen I.C.K. [...] iris en la Trian Regnon por ‘jubilei’, kiam la plej bravaj amikoj de la verda standardo putras kaj suferas en la karceroj kaj koncentraciaj tendaroj; se ĝi venis en la Trian Regnon por kanti la Zamenhofan himnon, kiam difuzas ankoraŭ en la aero kaj gratas la gorgon la haladzo el la libro-aŭtodafeo; se ĝi propravole iris en la trian regnon, kiu cinike kaj vandale neniigas ĉion, kio inter aliaj ankaŭ karakterizas la esperantismon – tiam ni postulas klarecon. Tiam ni postulas revizii la esencan karakteron kaj ideologion de la esperantismo! Tiam ni faru krucon super la glora kulturidea tradicio esperantista kaj ni deklaru, ke Esperanto estas nur kaj sole lingvo kaj nin tute ne interesas, kiu uzas ĝin: Zamenhof aŭ Goebbels; ke esperantisto rajtas bruligi librojn de Toller, Zweig, Mann, Spinoza, Wassermann, Einstein – kaj malgraŭ ĉio kalkuli je solidareco de la tutmonda ‘samideanaro’; ke esperantisto rajtas lanĉi zoologian antisemitismon kaj aranĝi mezepokan inkvizicion – kaj tamen aparteni al la ‘granda rondo familia’...”<sup>4</sup>



<sup>3</sup> Edvardo Wiesenfeld, “La VI Tutpola en Varsovio”, *Pola Esperantisto* 27. 1933, n-ro 6, pp. 81-87 (cit. p. 86).

Kelkajn monatojn poste Lejzerowicz revenis al la leciono, kiun donis la Kolonja Kongreso al la Esperanto-movado. Li atentigis, ke nelonge post ĝi la estraro de Germana Esperanto-Asocio anoncis la aplikon de la t.n. arjo-paragrafo, per kiu judaj membroj estus eksigitaj el gvidaj pozicioj, kaj menciis kiel freŝan, kolerigan fakton, ke germanaj esperantistoj tradukis en Esperanton kaj dissendis tra la mondo nazian propagandafon direktitan kontraŭ judoj. Amare li demandas sin, kiel li, “filo de l’ fie humiligata raso”, kondutu en la venonta UK, se tie li renkontos “‘samideanon’ en bruna ĉemizo”<sup>5</sup>.

La artikoloj, el kiuj mi citis, aperis plejparte en *Pola Esperantisto*, do ne en internacia Esperanto-gazeto. Lejzerowicz krome publikigis plurajn artikolojn, ĉefe pri internacia politiko, en *Literatura Mondo*. En februaro 1934, Lejzerowicz ricevis plian tribunon, *Nia Gazeto*, periodaĵon, kiu aperis en Nico (Francio) dum kvar jaroj kaj distingiĝis per forta sinligo al la ideo de liberala demokratio. Al ĝia unua numero Lejzerowicz kontribuis per la artikolo “Esperantismo en ekzilo”<sup>6</sup>, en kiu li konkludas, ke en movado, kiu allasas la aperon de esperantlingva kontraŭjuda pamfleto, la “ideaj esperantistoj” ne plu povas senti sin hejme. La novan gazeton li prezentas kiel insulon de la Zamenhofa esperantismo, kiel heroldon de vera demokrateco kaj kiel batalanton kontraŭ mallumo kaj malamo. Tiu ĉiam pli decida inklino de Lejzerowicz ne nur defendi la originan “puran idealismon” de la Esperanto-movado, sed rekte ankaŭ nomi aktualajn faktojn, kiuj laŭ li kontraŭas al la Zamenhofa ideo, multe agacis tiujn, kiujn li kalkulis inter la reprezentantoj de la oficiala movado. Plej forte reagis Teo Jung, kiu kompreneble memoris la kontraŭstaron de Lejzerowicz al la UK en Kolonjo. Aludante al la artikolo en *Nia Gazeto*, Jung en sia *Heroldo* malakceptis, ke Esperanto estu identigata kun la “interna ideo”, precipe se tiu estas senigata de sia karaktero kiel “io nepolitika kaj tre ĝenerala”. Jung rekte atakis Lejzerowicz pro lia artikolo kaj, ne indikante lian nomon, nomas lin “la plej ‘cinika’ incitulo en tuta Esperantujo”<sup>7</sup>. Kiam *Germana Esperantisto* aliĝis al la kritiko de Jung, *Nia Gazeto* malkaŝis, ke en enketo inter la membroj de Germana Esperanto-Asocio (GEA) el 1048 respondintoj nur 22 esprimiĝis favore al tuja enkonduko de la arjo-paragrafo – ke do signifa parto de la germanaj esperantistoj ne pretis subteni kontraŭjudajn agojn.

En la postaj jaroj la nazia reĝimo stabiliĝis. La signifon de tio por la Esperanto-movado Lejzerowicz en *Literatura Mondo* de novembro 1934 resume

---

<sup>4</sup> I. Lejzerowicz, “Sobre kaj decide”, *Pola Esperantisto* 27. 1933, n-ro 8/9, pp. 114-116 (cit. p. 116).

<sup>5</sup> 17 I. Lejzerowicz, “La mondo atentu!” *Pola Esperantisto* 28. 1934, n-ro 2, pp. 14-16 (cit. p. 15).

<sup>6</sup> 18 S. [sic] Lejzerowicz, “Esperantismo en ekzilo”, *Nia Gazeto* 1. 1934, n-ro 1, p. 3.

<sup>7</sup> 19 T.J., “Sub la masko de la ‘interna ideo’”, *Heroldo de Esperanto* 15. 1934, n-ro 765, pp. 1-2 (cit. p. 1)

bilancis en la artikolo, titolita “Zamenhof eraris”. La Majstro eraris, laŭ Lejzerowicz, kredante proksimigi homojn per sia lingvo, anstataŭ unue kongruigi iliajn opiniojn kaj konvinkojn. Nun en “nia ‘sankta’ lingvo estas eldirataj la plej malnoblaj profanaĵoj kontraŭ homeco”. Pri tio kulpas unuavice la mezkvalitaj gvidantoj de la Esperanto-movado. Al ili, laŭ li, “ĉiam mankis la vera intelekto, necesa por kulturi aŭ disvolvi nian propran ideologion, kiun ĉiu movado nekontesteble nepre bezonas”<sup>8</sup>. Poste Lejzerowicz dum iom da tempo silentis, devante kuraci gravan okulmalsanon<sup>9</sup>. Sed en aprilo 1936 li reaŭdigis sin per la akra kritiko kontraŭ la oficiala movado, kontraŭ tiuj “gvidantoj kaj misgvidantoj”, kiuj degradis la movadon preskaŭ al filatela klubo. Nelonge post la malpermeso de GEA (julio 1936) li kondamnas la provojn obei neŭtralecon en senco ne diferenciganta inter amikoj kaj malamikoj. Post la “entuziasmigado” fare de “falsaj profetoj”, la “imputado, ke nenia danĝero minacas nian movadon”, kaj precipe la ignoro de la fakto, ke “la hitlerismo estas la plej terura malamiko de la Esperantismo”, la movado atingis la nunan situacion: “En la Tria Regno, kiun niaj aŭtoritatoj antaŭ nelonge ankoraŭ kolombe amindumis, hodiaŭ Esperanto estas malpermesita.”

Lejzerowicz restas konvinkita, ke Esperanto transvivos la krizon de la movado. Kondiĉo por tio tamen estas, ke la movado senigu sin de la “akvokolora, kripligita, senenhava ideologio brue nomata ‘neŭtraleco’”. Li postulas, ke la movado racie adaptiĝu al internaciaj movadoj, “kiuj laŭ sia interna karaktero kaj enhavo staras proksime al la Esperantismo”. La malnova, falsa neŭtraleco devos esti anstataŭigita “per tia viviga sociala ideo, kiu ebligas al ni la varbadon de amikoj ĉie, kie la kulturo ne estas jam plene distretita, kie fuzas ankoraŭ komprenemo pri la noblaj celadoj komune-homaj”<sup>10</sup>.

---

<sup>8</sup> 20 Georgo Verda [=Izrael Lejzerowicz], “Zamenhof eraris”, *Literatura Mondo* IV, 1934, n-ro 9, p. 168. – Por substreki, ĝis kia absurdeco “neŭtraleco” povus iri, Lejzerowicz donas la jenan ekzemplon: “se amerikana, blankhaŭta kompreneble, esperantisto mortigus, pli bone ‘linĉus’, ‘samideanon’ negron, vi ne rajtus eldiri proteston kontraŭ tiu barbaraĵo, ĉar la blankhaŭta bandito, kiu feliĉigis la esperanto-movadon per sia aliĝo, subŝovus tiam antaŭ vian nazon la deklaron pri ‘neŭtraleco’ [...]” (I. Lejzerowicz, “Kvarope ni babilis...”, *Nia Gazeto* 1. 1934, n-ro 11/12, p. 3.)

<sup>9</sup> Dum tiuj jaroj li okupiĝis pri traduko de la novelo de Stefan Zweig, *Der Amoklaufer*. Ĝi estis anoncita por apero en 1935 ĉe la eldonejo Literatura Mondo, sed la eldono ne efektiviĝis. Ankaŭ ne realiĝis la plano de Lejzerowicz kompili antologion de juda literaturo eldonotan de Literatura Mondo.

<sup>10</sup> I. Lejzerowicz, “Malfermita vundo”, *Nia Gazeto* 3. 1936, n-ro 8/9, pp. 2-3. – Al tiu artikolo poste kontraŭdiris Jan Mędrkiewicz, “Intermiksitaj ideoj”, *Nia Gazeto* 3. 1936, n-ro 35, pp. 2-3 (“kondamni ‘barbarecon’ de Tria Regno, same kiel tiun de Sovetio” ne estas, laŭ la verkinto, la tasko de “Esperanto-aŭtoritatoj”, p. 3).

Lejzerowicz precizigas tie ĉi la principon de pozitiva neŭtraleco, jam elmetitan tuj antaŭ la Kolonja UK. Estas notinde, ke li faris tion kelkajn jarojn pli frue ol Ivo Lapenna, al kiu ordinare oni atribuas la meriton formuli tiun principon. Lejzerowicz ligas ĝin kun la pledo por konsekvenca demokratiigo de la movado. En tiu senco Lejzerowicz estas idea pioniro de la nova, postmilita reorganizita UEA. Oni devas klare diri al li, ke, dum la batalemon de Lapenna multe influis lia junaĝa ligo al marksismo, Lejzerowicz estis libera de sindependigo al ideologioj tiutempe modernaj: li fidis nur la konvinkon, kiun li akiris per sia studo de la ideoj de Zamenhof. Dum la 28-a UK en Vieno li ĝoje notis, ke, kiam ĉeĥoslovakiaj germanoj publike deklaris, ke la germanaj esperantistoj restas fidelaj al la Zamenhofa idealismo, “tiam uragano de aplaŭdoj kaj vivukrioj trakuris la salonon”<sup>11</sup>.

## Lingvosciencia angulo

*Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*

### *Da* – detalaj reguloj

Estas du kondiĉoj por uzi *da*:

- La **antaŭa esprimo** devas montri **kvanton**. Ĝi povu esti respondo al la demando “kiom?”.

- La **posta esprimo** devas esti laŭsence **nelimigita kaj nedifinita**.

Alie oni elektu alian rolvorteton, plej ofte *de*, sed ankaŭ ekz. *el* kaj *je* povas uziĝi, depende de la kunteksto.

Se tute ne temas pri kvanto, mezuro aŭ nombro, sed ekz. pri speco, oni ne uzu *da*, sed ordinare *de*:

- *Ni manĝis **specon de fiŝo***. La vorto *speco* neniam povas esprimi kvanton, mezuron aŭ nombron. Do neniam diru *\*speco da...\**.

- *Ĉe ni estas **manko de akvo***. La vorto *manko* neniam esprimas kvanton, mezuron aŭ nombron.

- *Pro **perdo de kuraĝo** ili ne venis*. La vorto *perdo* neniam esprimas kvanton, mezuron aŭ nombron.

Neniam uzu *da* rilate al A-vorto, eĉ se ĝi esprimas kvanton, mezuron aŭ nombron:

---

<sup>11</sup> Georgo Verda, “Wien 1936”, *Literatura Mondo* II, 6. 1936, n-ro 5, pp. 117-124 (cit. p. 121).

• *Ni renkontis multajn homojn.* (= *Ni renkontis multe/multon da homoj.*) Kvantaj A-vortoj, *multa(j)*, *kelka(j)*, *pluraj* k.a., ligiĝas rekte al la mezurata O-vorto kiel rekta priskribo sen *da*.

• *La botelo estas plena de/je akvo.* La A-vorto *plena* ĉiuokaze ne esprimas kvanton, sed staton. Ankaŭ la E-vorto *plene* ne esprimas kvanton: *Tie estas plene de/je homoj.* Neniam diru *\*plena da...\** aŭ *\*plene da...\**.

• *Tie ni trovis ĉambrom plenan de/je rubaĵoj.*

Frazparto kun difinilo (*la, tiu, ĉiu*, poseda pronomo...) estas difinita, do limigita kaj individueca (ne-substanceca). Sekve ne uzu *da* antaŭ tia frazparto, sed anstataŭe *de* aŭ *el*:

• *Ni manĝis iom de/el la pano.*

• *Ili aĉetis kelkajn botelojn de/el tiuj vinoj.*

Persona pronomo ordinare montras unu aŭ plurajn difinitajn individuojn. Tial ne uzu *da* antaŭ persona pronomo, sed anstataŭe *de* aŭ *el*:

• *Ni manĝis iom de/el ĝi.*

• *Ili aĉetis kelkajn botelojn de/el ili.*

Se la kvanto aŭ nombro jam estas montrata per nombra vorteto aŭ A-vorto, oni ne uzu *da*, sed *de* aŭ *el*:

• *Ŝi pagis kotizon de cent eŭroj.* La vorto *kotizo* ĉiuokaze ne esprimas kvanton. Sed oni ja povas diri *ŝi pagis cent eŭrojn da kotizo.*

• *Ni gustumis tre multe de unu vino.*

• *Ili manĝis ĉiom de/el tuta bovo.*

• *Li trinkis iom de/el kelkaj bieroj.*

Se unu-nombra O-vorto jam per si mem esprimas klare limigitan kvanton, oni ne uzu *da*:

• *Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro.*FE.14 *Jaro* montras per si mem klare limigitan tempon.

• *Ili fortranĉis duonon de centimetro.*

Luj vortoj foje esprimas kvanton, foje ion alian. La intencita senco decidus, ĉu oni uzu *da* aŭ alian rolvorteton:

• *Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino.*FE.32 *Glaso* jen montras individuaĵon, jen kvanton. (En la praktiko oni diras preskaŭ ĉiam *vinglaso* anstataŭ *glaso de vino.*)

• *Ili konstruis grandan reton da/de komputiloj.* Se la esprimo *grandan reton* montras, kiom *da* komputiloj estis, tiam oni diru *da komputiloj*. Sed se *grandan reton* montras, kiamaniere la komputiloj interrilatas (en la formo de granda reto), tiam oni diru *de komputiloj*.

La uzo de *da* do dependas de tio, kion la parolanto volas diri. Por helpi sin, oni povas imagi demandon, al kiu la frazo povus respondi:

- **Kiom** *da* soldatoj estis? – Estis grupo **da** soldatoj!
- **Kia** grupo *ĝi* estas? – *Ĝi* estas grupo **de** soldatoj!
- **Kiom** *da* rozoj vi volas? – Mi volas bukedon **da** rozoj!
- **Kian** bukedon vi volas? – Mi volas bukedon **de** rozoj!

Ofte estas necese atenti, ĉu la posta vorto estas pli grava (→ *da*), aŭ la antaŭa vorto (→ *de*). A **da** B estas B (en A-kvanto), dum A **de** B estas A (kiu iel rilatas al B): Grupo **da** soldatoj estas soldatoj (en grupa kvanto). Grupo **de** soldatoj estas grupo (kiu konsistas el soldatoj). Bukedo **da** rozoj estas rozoj (en bukedo kvanto). Bukedo **de** rozoj (aŭ bukedo **el** rozoj) estas bukedo (kiu konsistas el rozoj).

En esprimoj kun la vorto *nombro*, oni povas heziti inter *da* kaj *de*:

- La granda nombro **da** novaj partoprenantoj *ĝojigis* min. = La multaj novaj partoprenantoj *ĝojigis* min. Ili *ĝojigis* min.
- La granda nombro **de** novaj partoprenantoj *ĝojigis* min. = La nombro *ĝojigis* min. *Ĝi* *ĝojigis* min.

### Ekzemploj kun *da*, *de* kaj *el*

- Alportu al mi **metron da nigra drapo** (**Metro de drapo** signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo).FE.32 Metro estas jen kvanto, jen unu metron longa mezurilo.
  - Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe **aroj da bellanaj ŝafoj**.FE.34 Aroj ĉi tie montras kvanton.
  - Antaŭ nia militistaro staris **granda serio da pafilegoj**.FE.38 Granda serio ĉi tie montras kvanton.
  - Tri estas **duono de ses**.FE.14 Ses estas preciza limigita nombro.
  - Mi volus scii, **kiom de la ŝtofo** ili jam pretigis.FA1.108 La ŝtofo havas *la*, kaj montras do individuan limigitan ŝtofon.
  - La pastro prenos **iom el la sango**.Lv.4 La sango havas *la*, kaj montras individuan sangokvanton. Zamenhof tial elektis *el*. Oni povus ankaŭ uzi *de*, sed en Biblio *el* estas konsekvence uzata en tiaj ĉi frazoj.
  - Oni ne devas restigi **iom el ĝi** ĝis la mateno.Lv.7 *Ĝi* montras individuaĵon.
    - Tie malsupre kuŝas Germanujo, kiu iam estis kovrita de **plej densa reto de fervojoj kaj kanaloj**.FA3.55 Plej densa reto montras la aspekton, ne la kvanton, de la fervojoj kaj kanaloj.
    - Mi citos al vi **pecon de unu el tiuj leteroj**. Peco ĉi tie montras aŭ individuaĵon aŭ kvanton, sed la posta esprimo estas limigita per la vorto *unu*, tial oni devas uzi *de*.

• *Marta [...] rigardis la **pecon da ĉielo** videblan tra la malgranda fenestro.M.133 Ĉi tie peco montras kvanton.*

• ***Radio da varma sango** elŝprucis trans la glacieron kiel fontano.FA1.182 Radio normale ne montras kvanton, sed pro da ĝi ricevas tian signifon tie ĉi.*

• *En ilia profundo [= en ŝiaj okuloj] estis **iom da tia kunsento, kun kia homo matura, [...] rigardas naivan infanon.M.35** Tabelvortoj je A montras specon, ion nelimigitan.*

## Literaturaĵoj

*Robert Kamiński*

### Patrono de la jaro 2021 - Tadeusz Różewicz

Vendrede, la 27-an de novembro 2020, la Pola Parlamento elektis patronojn de la jaro 2021. Oni honoris sekvajn personojn: kard. Stefan Wyszyński, Stanisław Lem, Cyprian Kamil Norwid, Krzysztof Kamil Baczyński kaj Tadeusz Różewicz kaj anoncis, ke la jaro 2021 estos ankaŭ “Jaro de la Konstitucio de la 3-a de majo”.

Ni prezentas du poeziaĵojn de Tadeusz Różewicz. Tradukis ilin Tyburcjusz Tyblewski kaj prezentis en libro „Formoj de vizaĝo”. La libron eldonis en Jelenia Góra Soci-Kultura Societo kaj PEA en 1987.

---

Sube ni ankaŭ prezentas senditajn al nia redakcio novajn poeziaĵojn de Gizela Sklorz el Pyskowice.

#### Formoj

La formoj iam tiel bone ordigitaj  
obeaj ĉiam pretaj akcepti  
mortan poezian materion  
timigitaj per fajro kaj per sangodoro  
elviciĝis kaj diskuris

ili ĵetas sin sur sian kreinton  
dispecigas lin kaj tiras  
tra longaj stratoj  
tra kiuj jam delonge tramarŝis

ĉiuj orkestroj, lernantaro, procesioj

ankoraŭ spiranta viando  
sangoplena  
estas nutraĵo  
de la formoj perfektaj

ili kunkuras tiel kompakte super  
akiraĵo  
ke eĉ silento ne penetras  
eksteren.



## La deziro

Mi volus diri kolere kaj bele  
Ke junaj kuru al mi kiel parken  
Kie sun' staras kaj enhavas lumon

Mi volas paroli varme kaj simple  
Ke maljunuloj sentu sin bezonaj

Mi volus tiel diri ke la vortoj  
Tra larmoj venu al brilo de ridoj

Mi volus diri trankvile mallaŭte  
ke homoj povu kun mi bonriposti  
ridi kaj plori  
silenti kaj kanti

Mi volus diri kolere severe  
ke ili retrovu revojn perdigitajn:  
Flugilon iam el brak' elkreskitan

Mi volus ne diri  
sed agi pervorte  
ke vortoj miajn ektuŝu permane  
la homoj.

---

## Futuro

Hodiaŭa homaro  
Dum multaj jaroj  
Kontraŭ viruso batalos.

Oni emus denove  
Marŝi al laborejoj,  
Normale vivi, modeste

## Primavero

De primavera tago  
Serenas ĉirkaŭo,  
Pli kaj plu belas la mondo.

La naturo reen  
De sonĝo vekigās,  
Pli kaj plu bonas la homo.

## Rekomenco

Ĉiam oni povas rekomenci.  
En ĉiu jartago  
Vivcelojn difini,  
Alproksimiĝi al nova imago.

*Gizela Sklorz, 22.02.2021r*

## De amikec' ĉarmo

De amikec' ĉarmo  
Ĉi-granda donaco  
Esperon kunportas.

Ni volu ĝin disdoni,  
Tiel gajecon kroni  
Ĉie en la mondo.

*Gizela Sklorz 4.03.202*

*Pola Retradio*

### La saniga efiko de la ŝtupargrimpado

La regula ŝtupargrimpado estas bona rimedo por lertigi la funkciadon de la korangia sistemo, inkluzive malaltigon de la alta sangopremo kaj fortikigon de la piedmuskoloj. Sciencistoj rekomendas tion speciale por virinoj, post menopaŭzo, klarigante, ke elekto de la fizika aktivado por virinoj tiuvivperiode estas malfacila. Unuflanke malinstige efikas ofte monomanko, foresto de najbara sporta centro, malbona vetero kaj eĉ hontemo. Aliflanke unu el la kaŭzoj ligiĝas kun fiziologio. Nome, fortikigaj ekzercoj, ekzemple kun la uzo de halteroj, helpas konservi la muskolomason, sed grandigas la riskon de hipertensio ĉe mezaĝuloj aŭ personoj jam ĝin suferantaj. Ligo de ĉi-specaj ekzercoj, kun la streĉo rapidiganta la pulson, dank' al kio la muskoloj estas provizataj per sango riĉa je oksigeno, ebligas minimumigi tiun riskon.

La simpla ŝtupargrimpado ebligas ligi ambaŭ specojn de la trejnado, helpante forigi la grasohiston, plibonigi la kolesterolo-strukturon kaj malaltigi la riskon de ostoporozo. Ĝi kostas nenion kaj eblas ĝin praktiki diskrete.

Pri la efiko de ĉi-speca ŝtupargrimpa trejnado informis la periodaĵo, dediĉita al problemoj, ligitaj kun menopaŭzo. Raportis pri tio internacia sciencista kolektivo, ekzameninte grupon de koreinoj, kiuj ĉiutage grimpis 192 ŝtupojn du ĝis kvin fojojn. Ĉe ĉiuj estis konstatita pliboniĝo de la sanstato. La trejnado rezultigis malgrandigon de la minaca arterisklerozo kaj malaltigon de la sangotensio ĉe virinoj, suferantaj hipertensio. Pliboniĝis ankaŭ la muskoloforto de iliaj piedoj.





*Jerzy Dryja*

### Trajno Zamenhof daŭre vojaĝas

Eble ĉi tiu informo pri la ĉiutaga trajno "ZAMENHOF" InterCity, en la nova fervojhoraro (13 junio - 28 aŭgusto 2021), estos interesa kaj utila por la legantoj.

Vojlinio: WARSZAWA – POZNAŃ – ZIELONA GÓRA kaj reen.

WARSZAWA GDAŃSKA  
forveturo 06:28 / 06:36 / 06:46  
(en diversaj periodoj), POZNAŃ GŁ alveno 10:00, ZIELONA GÓRA GŁ.  
alveno 12:23 / 12:19 / 12:23 (en diversaj periodoj),

ZIELONA GÓRA GŁ. forveturo 15:04 POZNAŃ GŁ. forveturo 17:21,  
WARSZAWA ZACH. alveno 21:04, WARSZAWA CENTR. Alveno 21:10,  
WARSZAWA WSCH. alveno 21:21

Atenton: En Varsovio, la forveturo per la trajno "Zamenhof" trajno al Poznań - Zielona Góra nur de la fervojstacio Warszawa Gdańska.

En la interfervojstacioj Zbąszynek – Zielona Góra Gł. – Zbąszynek la vojaĝo per speciala aŭtobuso.

La unua tabulo de la trajno Zamenhof kun subskribo de la urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski. (Nun ĝi troviĝas en la sidejo de Bjalistoka Esperanto-Societo)



*Robert Kamiński*

### Oni demandis pri Esperanto kaj ĝia kreinto

Ni parolas pri la temoj de taskoj, aperintaj dum la ĉi-jara matura ekzameno de la angla lingvo en la baza nivelo. La 6-an de majo 2021, en la demandfolio de la Centra Ekzamena Komisiono, aperis naŭ taskoj, de la Matrikula Ekzameno. La demandoj traktis plej diversajn temojn, unu el ili havis demandon pri Esperanto kaj Ludoviko Zamenhof. Demandfolio de

CKE, kune kun la proponitaj solvoj, videblas en la retejo:  
<https://arkusze.pl/maturalne/jezyk-angielski-2021-maj-matura-podstawowa.pdf>



*Ilona Koutny*

## Informoj pri la nova interlingvistika grupo

Ĵus aperis varbfilmeto por la nova interlingvistika grupo:  
<https://www.youtube.com/watch?v=-cvm2ybeKcs>

Vi povas trovi informojn en: <https://edukado.net/novajhoj?id=849>  
kun aliaj filmetoj kaj en la retejo de la studoj: <http://interl.amu.edu.pl>

Intervjuo kun la gvidanto de la Studoj en: [http://pola-retradio.org/2021/04/e\\_elsendo-el-la-07-04-2021/](http://pola-retradio.org/2021/04/e_elsendo-el-la-07-04-2021/)

Prezento de la Interlingvistikaj studoj fone de universitata instruado:  
<https://esfconnected.org/2021/07/09/interlingvistikaj-studoj-uam-poznano-pl/>

Se vi bezonas pluajn informojn aŭ volas aliĝi, skribu al:  
[interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl)

**Kaptu la okazon kaj aliĝu al la sekva interlingvistika grupo aŭ informu viajn konatojn pri la universitataj studoj!**

**Ili okazos plejparte rete.** Jam estas aliĝintoj el Ĉinio, Koreio, Brazilo, Francio, Norvegio, Slovakio....

Ni atendas vin, en la nomo de la instruista stabo Ilona Koutny (gvidanto de la Studoj)

## Kalendaro de Esperanto-aranĝoj

### Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2021

21.-24.05. 2021	Virtuala Germana-Pola Esperanto-Kongreso Kun Fervojistaj E-kongreso 2021	Pola Esperanto-Asocio Germana Esperanto-Asocio Internacia Fervojistaj Esperanto-Federacio
18-30.06. 2021	43-a Ĉebalta Esperantista Printempo En Mielno-Unieście	Pola Esperanto-Asocio, Filio en Gliwice, Stanisław Mandrak, 44-114 Gliwice, ul. Kormoranów 16/5 <a href="mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com">stanislaw.mandrak@gmail.com</a>

20.06.2021	Montara renkonto sur monto Czantoria Wielka en Beskidy-Montaro	<a href="http://www.esperanto.zanet.pl/cxantorio/suchanek@seznam.cz">http://www.esperanto.zanet.pl/cxantorio/suchanek@seznam.cz</a>
29-31.07-2021	Pol'and'Rok - PollandRok (eks-Woodstock) Memzorga renkontiĝo de mojosaj, festemaj esperantistoj kadre de la rokmuзикfestivalo. Lotnisko (flughaveno) Makowice-Ploty.	<a href="http://krokodilo.de/woodstock/woodstock.php">http://krokodilo.de/woodstock/woodstock.php</a> andim@gmx.li
25.07-1.08.2021	94-a (reta) Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda	Sennacieca Asocio Tutmonda Bjalistoka Esperanto-Societo <a href="http://sat.bialystok.pl">sat.bialystok.pl</a>
7-14.08.2021	Kristana Kongreso (kadre de 70-a KELI-kongreso) en Legnica	Katolika Esperantista Ligo internacia <a href="https://keli.sea-vroc.eu/">https://keli.sea-vroc.eu/</a>
4.09.2021	Nacia Legado en Bjalistoko. Prezentado de Esperanto-traduko de „La moraleco de sinjorino Dulska”	Bjalistoka Esperanto-Societo, <a href="https://espero.bialystok.pl/eo">https://espero.bialystok.pl/eo</a>
1-9.09.2021	54-a Internacia Esperanto-Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto-Asocio <a href="mailto:pomer@wp.pl">pomer@wp.pl</a>
10-12.09.2021	„Esperanto sur strando” en Sopot Temo „Urbo kaj akvo”	Triurba Esperantista Asocio "Toronto" <a href="https://www.facebook.com/groups/ESPERANTOWSOPOCIE">https://www.facebook.com/groups/ESPERANTOWSOPOCIE</a>
12.09.2021	100-a naskiĝtago de Stanisław Lem. Prezentado pri Esperanto-traduko de „Solaris”. Ekspozicio de diverslingvaj eldonoj.	Bjalistoka Esperanto-Societo, <a href="https://espero.bialystok.pl/eo">https://espero.bialystok.pl/eo</a>
12.09.2021	9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021 - koncerto de venkintoj	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado <a href="http://www.ecem.com.pl">www.ecem.com.pl</a>
17-19.09.2021	36-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES 2021	„Esenco“ Poznań, <a href="http://www.arkones.org/pl">http://www.arkones.org/pl</a> NE KONFIRMITA
10.2021	45-aj Esperanto-Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE NE KONFIRMITA
11.2021	Glivicea Rendevuo de Praktikantoj kaj Uzantoj de Esperanto GRUPE 2021	PEA-filio en Gliwice NE KONFIRMITA

10-12. 12.2021	22-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj	Bjalistoka Esperanto-Societo
28.12. 2021 04.01.22	13-a Junulara Esperanto-Semajno JES en Wittenberg (Germanio)	Pola Esperanto-Junularo Germana Esperanto-Junularo www.pej.pl

## Universalaj Kongresoj de UEA

17-24.07. 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Belfasto (Nord-Irlando) okazos en virtuala formo (2-a Virtuala UK)	Universala Esperanto-Asocio uea.org
1-8.08. 2022.	La 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). En 2020 okazis nur virtuala kongreso. UK en tradicia formo UK okazos en 2022	Universala Esperanto-Asocio uea.org

## Elektitaj renkontiĝoj en najbaraj landoj

2-11. 07.2021	Somera Esperanto-Studado (SES) okazos virtuale	<a href="https://ses.ikso.net/2021/pl/">https://ses.ikso.net/2021/pl/</a>
30.07- 8.08. 2021	77-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Kijevo, Ukrainio okazos en reto	<a href="http://ijk2021.retejo.info/#">http://ijk2021.retejo.info/#</a> , <a href="mailto:tejoofficejo@gmail.com">tejoofficejo@gmail.com</a>
17-22. 10.2021	9-a EMA Esperantista Migrado Aŭtuna en la Palatinata Arbaro, okcidenta Germanio	<a href="http://www.esperanto.de/eo/ema-eo">www.esperanto.de/eo/ema-eo</a> , <a href="mailto:ema@esperanto.de">ema@esperanto.de</a>

## Diverse, facile, bonguste

*Robert Kamiński*

### Biskvito, kiu ĉiam sukcesas kaj kreskas bele

Por mem prepari torton, oni bezonas bone bakitan bisviton, kiu estas bazo de tiu dolĉa kuko. Jen recepto por la bona biskvito. Malvarmaj ovoĵoj kaj varma akvo malebligas ruinigi ĉi tiun biskviton. Provu ĝin mem. Bezonataj ingrediencoj:

- 6 malvarmaj ovoĵoj
- 0,75 glaso da fajna sukero (glasoj 0,25 l)
- 0,75 glaso da kuka faruno
- 0,25 glaso da terpoma faruno
- unu kaj duona kuleretoj da bakpulvoro
- 3 kuleroj da varma akvo
- salo

Preparado: 1. Apartigu blankajn kaj flavajn partojn de ovoĵoj. 2. Aldonu iom da salo al la ovoblankeco kaj batu ilin, por ke ilia koloro fariĝu blanka. 3. Aldonu sukeron, malrapide sen ĉesi la batadon. 4. Batu plu, ĝis la sukero estos degelita. 5. Aldonu malrapide la ovoflavaĵojn. 6. Kribru ambaŭ farunojn kun bakpulvoro kaj aldonu ilin al la vipitaj proteinoj. 7. Aldonu varman akvon. 8. Miksu ĉion per kulero. 9. Verŝu la mason en kukujon tegitan per bakpapiro sen lubrikado de la flankoj. 10. Baku dum duonhoron en antaŭvarmigita ĝis 175-gradojn forno. 11. Forigu la flankojn de la risortformo kaj turnu la kukon interne eksteren. 12. Malvarmigu ĝin, tiam tranĉu ĝin horizontale en du aŭ tri partojn. 13. Trempu la biskvitojn kaj metu inter pecojn kremon, konfitaĵon ktp kaj ornamu ĉion per kremo kaj fruktoj. Se anstataŭ hela biskvito, ni volas malhelan biskvitojn, simple aldonu al la pasto unu kuleron da kakao kaj alian kuleron da bolanta akvo.



## Oni eldonis

*Przemysław Wierzbowski*

### Nacia Legado en Esperanto 2021

Bjalistoka Esperanto-Societo, Bjalistoka Kulturcentro/Centro Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto-Libraro/Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki invitas al prezento de dulingva dramo „Moraleco de sinjorino Dulka” de Gabriela Zapolska: en la pola originalo kaj la unua Esperanto-traduko de Tomasz Chmielik kaj Lidia Ligęza.

La ĉeesta renkontiĝo okazos kadre de la Nacia Legado la **4-an de septembro 2021 je 15h00** en la Centro Ludoviko Zamenhof, str. Warszawska 19, Bjalistoko. En la renkontiĝo ni parolos kun la tradukintoj pri ilia laboro.

La partoprenantoj ricevos senpagan ekzempleron de la libro kun speciala stampo. La renkontiĝon akompanos kvizo pri la libro kaj legado de fragmentoj de la dramo. La evento estos partoprenebla rete.


**ĈIUJN, kiuj ŝatus anticipe ricevi la tekston de la Esperanto-traduko por organizi la legadon ĉe si, ni petas kontakti nian asocion per kontakt@espero.bialystok.pl — ni legu kune la tekston; registru la renkontiĝon kaj publikigu por diskonigi la projekton!**

La eldono estas financita kaj kuneldonita de la Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko.

La Nacia Legado estas pola kampanjo komencita en 2012, en kiu fragmentoj de elektita verko estas publike legataj. Ĝi celas popularigi konatecon de la nacia literaturo. Ĉiujare la Nacian Legadon partoprenas Bjalistoka Esperanto-Societo, kiu okazigas renkontiĝojn dediĉitajn al la verkoj.

Ĝis nun, okaze de la Nacia Legado ni sukcesis eldoni: 2015 – *La Pupo* de Bolesław Prus; 2016 – *Quo vadis?* de Henryk Sienkiewicz; 2018 – *Antaŭprintempo* de Stefan Żeromski; 2019 – *Ok noveloj* de polaj verkistoj kaj en 2020 – *Baladina* de Juliusz Słowacki.

Mi ankaŭ sendas kovrilan projekton por la romano "Solaris" de Stanisław Lem. Ĝi estos la unua libroforma eldono de liaj verkoj. „Solaris” estis tradukita ĝis nun en pli ol 40 lingvojn. La libro-prezento okazos la 12-an de septembro je la 100-a naskiĝtago de





Stanisław Lem en Centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko ĉe la str. Warszawska 18 je la 16:00h. La evento ankaŭ estos elsendata per interreto. La evento ĉe Eventa Servo:

<https://eventaservo.org/e/solaris> - detaloj pri partopreno per interreto aperos en la venontaj semajnoj.

Stanisław Lem, „**Solaris**”

Tradukis: Przemysław

Wierzbowski,

Eldonisto: Bjalistoka Esperanto-Societo,

ISBN: 978-83-962222-0-6.

La libro estos havebla de septembro ĉe la retejo de la eldonisto:

<https://espero.bialystok.pl/pl/>



*Elżbieta Karczewska*

## Nova interesa libro pri la bjalistoka regiono



Unu jaron post la pollingva eldono de la libro *Kun Dipatrino sur biciklo. Vojaĝo al miraklaj bildoj, ikonoj kaj sanktaj fontoj de Podlaĥio* de Wojciech Koronkiewicz, Bjalistoka Esperanto-Societo decidis aperigi Esperanto-tradukon de ĉi tiu gvidlibro pri nia regiono.

La libro estas frukto de kunlaborado de granda teamo. Krom Wojciech Koronkiewicz, la aŭtoro de la teksto kaj la fotoj, necesas menciigi Elżbieta Karczewska, kiu donis la ideon eldoni la libron en Esperanto kaj estis la ĉefa tradukanto. Ceterajn rakontojn pri miraklaj lokoj de Podlaĥio tradukis esperantistoj el la tuta Pollando: Grażyna Barszczewska-Banel, Dorota Burchardt, Paweł Dzieńis, Robert Kamiński, Elżbieta Krawiec, Halina

Kuropatnicka-Salamon, Krzysztof Łobacz, Nina Pietuchowska, Waclaw Rekowski, Halina Rózanek, Bernarda Wiewiórska, Adam Wilkus kaj Andrzej Zejdlar. La libron kompostis kaj la projektis la kovrilon Przemysław Wierzbowski.

La libro estas aĉetebla en la libroservo de BES en libroservo de BES.

*Kion vi trovos en la libro?* Homojn, Dipatrinon, biciklon, Podlaĥion, vin mem... Unuvorte – ĉion!

Ĉu la titolo sugestas, ke jen unu plia enua turisma gvidlibro? Se jes – vi ege eraras! Wojciech Koronkiewicz, verkante ĉi tiun libron, starigis por si multe pli ambician celon. Li deziris doni al la leganto vivan, imago-konvinkan bildon de la podlaĥia regiono kaj ĉefe de ĝia religieco, kiu dum jarcentoj, pro la geografia situo, iĝis eksterordinare interesa kaj unika. Ĝi konektis la orienton kun la okcidento, Romon kun Konstantinopolo, katolikismon kun ortodoksismo. Kian efekton tio donis? Kiel tio influis la pensmanieron de la lokaj loĝantoj? Ĉi tion la leganto ekscios ĝuste el ĉi tiu libro.

Ĉu la celo, kiun starigis por si la aŭtoro, estis atingita? La legantoj senhezite opinias, ke jes! Jen kiel pri la libro skribis Szymon Hołownia: „Koronkiewicz, kiel neniu alia, scipovas pentri la varman lumon de senhastaj paroloj de la ĉelimaj homoj. Antaŭ dudek kvin jaroj mi forlasis ĝin forveturante en la svarman mondon. Estas bone scii, ke ĝi plu estas tie”. Do ne gravas, ĉu vi devenas el Podlaĥio kaj deziras sentimentale reveni tien, aŭ ĉu tiu regiono estas por vi konata nur el rakontoj — ajnokaze ni invitas vin al legado!

---

Jam aperis libro, de Roman Dobrzyński "Verda Simio" kiun konsistigas amuzaj monologoj kaj felietonoj.

---

*Roman Dobrzyński, „Verda Simo”*

Redaktado: EwaTracz

Projekto de kovrilo: Karina Kuśnierz

Eldonanto: Pola Esperanto-Asocio


Varsovio 2021

ISBN 978-83-908340-9-2

Grandeco: A5 15x21 cm, 156 paĝoj

Prezo: 20,- zlotoj + sendokosto

La libro aĉetebla ĉe Pola Esperanto-Asocio. [estraro@esperanto.pl](mailto:estraro@esperanto.pl)




## Forpasis

La 7-an de junio 2021 en Krakovo forpasis samideano, muzikisto, gvidanto de Esperanto-koruso "Kamea" - **Zbigniew Warmuz**. La adiaŭa ceremonio okazis la 14-an de junio sur la tombejo Prądnik Czewony ĉe la str. Powstańców 48 en Krakovo. (sektoro LXXXVIII-88, vico 5, loko 30)  
Kun la granda malĝojo, Grażyna Porada – Krakova Societo Esperanto

## El fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*

### 11-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, 10-13.12.1993



Stanisław Świstak en akceptejo



Ĉefsalono - en unua vico sidas de maldekstre: Jadwiga Gibczyńska kaj Grażyna Maszczyńska-Góra



E-Tagoj de Krakovo, 1993 Foto: A. Sochacki

Kantas Esperanto-  
koruso „Kamea”



E-Tagoj de Krakovo, 1993 Foto: A. Sochacki

De maldekstre sidas  
J. Wasik, Tyburcjusz  
Tyblewski, Lidia Ligeza  
kaj G.Turbański



E-Tagoj de Krakovo, 1993 Foto: A. Sochacki

M. Warmuz prelegas  
pri pac-movado



E-Tagoj de Krakovo, 1993 Foto: A. Sochacki

S. Świstak dankas al J. Dziegelewska kaj G. Nazarko



E-Tagoj de Krakovo, 1993 Foto: A. Sochacki

Tyburcysz Tyblewski



E-Tagoj de Krakovo, 1993 Foto: A. Sochacki


Jadwiga Gibczyńska dum la monodramo „La falanto“



Adam Wilkus

## Krucenigmo pri floroj

1. Floro kvinpetala, blukolora, kun la flava mezo, alta ĝis 100 cm, pri kiu temas jena mito: Iam, dum la mezepoko, kavaliro kun sia amatino promenis laŭlonge de rivero. Dum la plukado de fasko da floroj li falis en la akvon pro la pezo de sia kiraso. Dum dronis li ĵetis la faskon da floroj al sia amatino kaj kriis „Ne forgesu min”. Ĉi tiu



floro estas ligata al romantikismo kaj tragikeco kaj ofte estis portata de virinoj kiel signo de fideleco kaj senfina amo.

2. La bulba, plurjara planto, kreskanta 10–70 centimetrojn alten, kun kelke da larĝaj, verdaj folioj senvastaj, ovoformaj, elipsaj aŭ lancetformaj, kaj grandaj floroj kun korolo el ses petaloj. Ĝi estas la plej vaste kultivata, ornama planto en la mondo. Ekzistas ĉirkaŭ 150 specioj diverskoloraj kaj multege da hibridoj de la floro. Unu el ili, kies koloro estas ruĝa kun verda strio sur la florfolio, en 1994 jaro ricevis la nomon „Esperanto”, proponitan de la nederlanda firmao Bakker. Petaloj de ĉi tiu floro malfermiĝas je altaj temperaturoj (pli ol 15 °C) kaj fermiĝas je malaltaj temperaturoj (malpli ol 13 °C). Ĉi tiu fenomeno, nomata la termonastio, gravas por la poleniga procezo, ĉar insektoj plej ofte polenas florojn en la suno kaj varmo.

3. Unujara planto, alta ĝis 2 metroj, kies ronda floro, 30-40 cm larĝa en diametro, havas flavajn petalojn kaj en la mezo nigrajn fruktetojn (semoj en nigra ŝelo). Laŭ formo ĝi similas al la suno. Vincent van Gogh pentris faman bildon pri tiuj floroj.
4. La planto, kies multaj specioj kreskas kiel ornaj floroj. Ĝi estas alta ĝis 120 cm, floroj grandaj ĝis 16 cm kun 4 aŭ, malofte, 6 petaloj. Kutime ruĝa aŭ oranĝa, sed ankaŭ en aliaj nuancoj de blanka, rozkolora, malhelviola, flava aŭ purpura. De la kuraca specio oni produktas morfinon kaj heroinon. En Britio, tiu floro estas simbolo de la Unua Mondmilito, precipe ĉar ili abunde floris sur la batalkampoj de Flandrio. Populara pola kanto omaĝe al la polaj soldatoj, kiuj perdis sian vivon luktante ĉe Monte Cassino en Italio dum la Dua Mondmilito, temas pri tiuj floroj ruĝkoloraj.
5. Plurjara herbeca planto, kiu formas vastajn koloniojn, disigante siajn rizomojn, kies stolono starigas rampotigojn dum somero. La tigoj estas 15–30 cm altaj, kun unu aŭ du folioj 10–25 cm longaj. La folioj estas verdaj kaj kreskas rekte de la rizomoj kaj havas varian formon - de elipsaj ĝis lancetformaj. La floradaj tigoj havas du foliojn kaj florojn aranĝitajn en floraro de 5-15 floroj. La korolo havas ses tepalojn kaj sonorilan formon, ili estas blankaj aŭ helrozaj, kun milda parfumo. Ĝi estas kuracherbo kaj populara ornama planto. Alia nomo estas majfloro aŭ „lilio de la valo”.
6. Specio de violo, kun floroj grandaj ĝis 12 cm, pri kiu el la kvin petaloj nur unu malsupren direktas, kontraŭe al aliaj violoj, pri kiuj tri petaloj malsupren direktas. Ĝi estas dekoracia planto, kultivata en grandega nombro da specoj. Plejofte ĝi estas uzata por florbedo, balkonaj ŝrankoj kaj fenestroj kaj nomata la ĝardena violo. La Esperanta nomo devenas de la franca vorto „pensée”. En la floringvo la moto de tiu floro estas: „Pensu pri mi, kiel mi pensas pri vi”, ĉar la floro estis konsiderata kiel simbolo de rememoro de unu amanto pri la alia.
7. La herbeca staŭdo, utiligata kiel kuracplanto kaj en kuirado. Ĝi estas la plej konata pro siaj flavaj kapituloj, kiuj ŝanĝas sin en rondajn arĝentajn globojn kies fruktoj estas vente forblovitaj. Tigoj estas tipe 5 ĝis 40 cm longaj. La folioj estas 5–45 cm longaj kaj 1–10 cm larĝaj, lancetformaj, aŭ inverse ovoformaj kun la bazoj, kiuj iompostiome mallarĝiĝas al la petiolo.
8. La plurjara herba planto, kreskanta proksime al la grundo, malalta (4–20 cm longa), kun 2–5 cm longaj, ĉiamverdaj folioj. La floroj estas 2–3 cm larĝaj kaj havas blankajn flankpetalojn kaj flavan mezon. La florportantaj tigoj estas senfoliaj, 2–10 cm altaj. Estas ludo, en kiu iu persono provas diveni amon de iu per tiu floro. La persono alterne elparolas la frazojn "Li (aŭ "Ŝi") amas min," kaj "Li (aŭ "Ŝi") ne amas min," dum deŝirado de petalo de la floro por ĉiu frazo. La frazo, elparolita dum la lasta petalo, validas kiel vera sento.
9. Floro, kiu estas antikva simbolo de amo kaj beleco. Ekzistas diversaj specioj diverskoloraj. Laŭ la populara proverbo ne ekzistas tiaj floroj sen dornoj, kio signifas, ke ne estas ĝojo sen malĝojo aŭ, alivorte, al ĉio rilatas iuj avantaĝoj kaj malavantaĝoj. La plej granda en Eŭropo aro de tiuj floroj sovaĝe kreskantaj situas en la Pipra Montaro apud Sandomierz.

Robert Kamiński

## Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando - 3

Ekde kreado de la internacia lingvo Esperanto, pasis 133 jaroj. Jam dum la vivo de ĝia kreinto, esperantistoj en la tuta mondo honoris lin, nomigante stratojn per la nomo de Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. Antaŭ kaj post la morto de la Majstro aperas en la tuta mondo tiaj monumentoj, placoj, parkoj, memortabuloj, ŝipoj, kaj eĉ astroidoj. Kreskanta Esperanto-movado sammaniere honoras ankaŭ aliajn aktivajn membrojn.

Ankaŭ en Pollando - patrujo de Esperanto, ekde la jaro 1919, aperas diversaj objektoj kun nomoj kunligitaj kun L. Zamenhof kaj E-movado. La impona nombro de ili konstante kreskas. La sube prezentita listo montras ĉiujn, ĝis nun registritajn, tiuspecajn objektojn en Pollando. Mi volas prezenti la polan ZEO-liston en la sekvaj ses numeroj de „Pola Esperantisto“.

Mian registradon de ZEO en Pollando mi komencis en la jaro 1996. Registradon de ZEO-j en la mondo komencis *Hugo Röllinger*, per la libro „Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj, en 54 landoj”, kiun eldonis UEA en 1997. Ekde tiu jaro mi serĉas kaj registras ĉiujn objektojn, dediĉitajn al nia majstro kaj Esperanto-movado.

Ni kune kompletigu kaj korektu la liston. Se vi trovos novan, ne registritan ZEO-n, aŭ se vi havas pli detalajn informojn pri ĝi, bonvolu kontakti min. Jen mia retadreso: rk-lodzo@wp.pl. Vi ankaŭ povas viziti la fejsbukan retpaĝon pri ZEO: <https://www.facebook.com/groups/128827667179539>.

Ĉu vi memoras kaj zorgas pri ZEO en via ĉirakŭaĵo? Kontrolu, ĉu ĝi ekzistas. Purigu tabulon, metu florojn ĉe la monumento (eĉ artefaritajn). Montru, ke ekzistas homoj, por kiuj ĉiu ZEO estas grava.

N-ro	Situo	Objekto	Ekzistas de la jaro
82	Łódź, kvartalo „Śródmieście”	Zamenhof-strato	18.05.1920
83	Łódź, ĉe la str. Kruczkowskiego 4, kvartalo Dąbrowa	Zamenhof-lernejo – 31-a Ĝeneraleduka Liceo je la nomo L. Zamenhof,	1964
84	Łódź, ĉe la str. Piotrkowska 75	Zamenhof-murpentraĵo (fresko)	03.11.2000
85	Łódź, katolika tombejo ĉe la str. Ogrodowa 39,	Epitafo de tombo de „Kabe” – Kazimierz Bein, placo n-ro 26.	15.6.1959
86	Łódź, tombejo „Doły”, al. Palki 9	Tombo de Stanisław Karolczyk	19.8.1966



87	Łódź, tombejo „Zarzew - Komunalny” ĉe la str. Przybyszewskiego 325	Esperantlingva-surskribo (sur tombo de Liliana Palczewska)	01.1998
88	Łódź, (antaŭ la domo ĉe la str. Piotrkowska 104	E-pavimero kun metala tabuleto „Lodza Filio de Pola Esperanto-Asocio” nr. 8152	20.04.2003
89	Łódź, ĉe la str. Zamenhofa 1/3	Memortabulo al Zamenhof	1937,1964,1974
90	Malbork, en Parko de la mondo	Zamenhof-Monumento	11.06.2000
91	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Esperanto (kverko)	01.04.2000
92	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Aŭstralio	09.11.2002, 22.11.2003
93	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono "Barato", (tuliparbo)	02.08.2009
94	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Bulgario (platanacero)	22.9.2001
95	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Brazilo (robinio)	21.9.2002
96	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono "Britio" (platano)	02.08.2009
97	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Ĉehio (tilio)	21.09.2002
98	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Eŭropa Unio	21.07.2005, 10h
99	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Ĉilio (betulo)	31.08.2001
100	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Francio (sorpujo)	10.09.2002
101	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Germanio (kverko)	15.12.2000
102	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Hungario (fago)	21.09.2002
103	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Italio (lariko)	22.09.2001
104	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono IFEF (kverko)	25.05.2008. 9h
105	Malbork, en Parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Israelo (cedro)	06.04.2007 9.00 h.
106	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Irlando (acero)	21.09.2002
107	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Japanio (ĉerizujo)	25.07.2003
108	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Etsuo Mijoshi	30.06.2011
109	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Kaŝubio	30.06.2011
110	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono DR Kongo	22.11.2003
111	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Koreio (alizujo)	15.12.2000
112	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Latvio (betulo)	21.09.2002
113	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Litovio (tilio)	21.09.2002
114	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Maribor (vito)	16.05.2003
115	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Neubrandenburg (frakseno)	10.12.2002
116	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Nordhorn (acero)	07.09.2002
117	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Pollando (frakseno)	21.09.2002
118	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono de Romoj (Ciganoj)	14.08. 2006
119	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Ruslando (plorsaliko)	28.04.2002
120	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono San Marino (ginko)	22.09.2001
121	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Sölvesborg (fago)	21.09.2002
122	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj ŝtono Svedio (junipero)	21.09.2002
123	Malbork, apud la urbodomo en la	Esperanto-memorŝtono okaze de la	02.08.2009

	kv. „Malnova Urbo”	Centjara Jubileo de Esperanto-Movado en Malborko,	
124	Malbork, en parko de la mondo	Arbo kaj memorŝtono omaĝe al Antoni Grabowski (karpeno)	02.08.2009
125	Malbork, apud urbodomo en en kvartalo „Malnova Urbo”	Arbo kaj memorŝtono omaĝe al Papo Johano Paulo la Dua (kverko)	02.08.2009
126	Malbork, en parko de la mondo	Obelisko kun esperantlingva surskribo - donaco de la urbo Seattle (USA)	07.08.2007 (24.06.?)
127	Malbork, Teŭtona Kastelo sur la roza teraso de „Alta Kastelo”	Esperantlingva tabulo - ĉe la vito el Maribor	16.05.2003
128	Malbork, en parko de la mondo	Esperantlingva Informtabulo pri “Parko de la Mondo”	10.09.2002
129	Malbork, preĝejo al s-ta Johano Baptisto – kv. „Malnova urbo”	Esperantlingva tabulo al Bernardo Binnebesel	26.10.2003
130	Malbork	Zamenhof-placo	15.10.1993
131	Malbork	Skvaro Esperanto kun Parko de la mondo	15.12.2000



Ludoviko Zamenhof-strato en Łódź



Kverko kaj ŝtono al IFEF en Malbork

### Erarĝustigo por PE 2-2021

estas	devas esti
paĝo 2 - rezigni pri la <i>ĉesta</i> formo	rezigni pri la <i>ĉesta</i> formo
En la ĉapitro <i>literatuaĵoj</i>	En la ĉapitro <i>literaturaĵoj</i>
<i>invitas</i> vin per la artikolo	<i>invitas</i> vin per la artikolo
<i>Kaŭgorzata</i> Komarnicka	<i>Maŭgorzata</i> Komarnicka
paĝo 6 - <i>humoron</i>	<i>humuron</i>
paĝo 26 - <i>Pierkiej</i> el Kety	<i>Pierkiel</i> el Kety



Esperantistoj el Sopot kore invitas  
vin al E-renkontigo en Sopot  
„Esperanto sur la strando 2021”  
por aliĝi venu al:  
<https://google.com/prod/view/triurbo>






# NIA FOTO-GALERIO

**Transponta Esperanto-Kongreso**  
 germana - pola - fervojista  
 Frankfurt (D) / Slubice  
 21-a ĝis 24-a de Majo 2021  
 · NAJBAROJ ·

Partoprenantoj de la kongreso



Koncertis Jerzy Handzlik kaj Kiara

## German-pola landlima regiono

1. Evoluo meze de la 20a jarcento: De dulingva kontaktregiono al „plej strikta lingva limo en Eŭropo“.
2. Evoluo de diversaj translimaj kontaktoj post 1990, speciale post 2004 kaj 2007.



Prelegis Goro Kimura



Muzikvespero Kun Frei-Lech-Trio kaj fluta interludo de Marek Nahajowski